Burnley.—Esperanto continues to make excellent progress in this neighbourhood; in fact, in the words of the *Burnley Express*, Esperanto has never been so strong as it is to-day, and this applies particularly to this town. So many students have been enrolled for the classes arranged for this session, that new ones have had to be formed to cope with the number. At the Esperanto office (*Victoria Chambers, Hargreaves-street*, open daily) there are already one advanced, one intermediate, and five elementary classes, besides four elementary classes at various schools; the elementary students number 120. Other classes will probably be started shortly.

Cheltenham.—Nia nova programo por la venontaj tri monatoj komencigis la 6an Oktobro, kaj ni esperas, ke ĝi allogos multajn Esperantistojn al niaj kunvenoj. La 13an Oktobron ni ricevis viziton de nia malnova amiko, S-ro Westmancote, el Bristol, kiu multe interesis nin per rakonto pri siaj klopodoj por la kara lingvo en sia urbo.

La Esperanta kurso en la Teknika Lernejo progresas bone sub la direkto de S-ro Garnick. Ses el niaj grupanoj aliĝis por prepari por la ekzameno de la London Chamber of Commerce.

Eccles.—Je la 1a de Oktobro, S-ro Paul Blaise, laŭ la invito de ĉi tiu grupo, faris paroladon pri "Belgujo kaj la Belgoj," por pligrandigi la "Belgian Relief Fund." La amaso de ĉeestantoj estis tiel granda, ke multaj ne povis eniri la halon, kaj la aŭskultintoj

donis tiel malavare, ke sumo de pli ol £130 estis forsendita al la Belga Ambasadorejo.

Keighley.—The annual meeting of the Esperanto Society here took place on October 5, at the Keighley Technical Institute, Mr. Joseph Rhodes presiding. The Twelfth Annual Report was presented by the secretary, Mr. Frank C. Rhodes. It showed that interest in the international language in this district has been well maintained. Classes have been held as usual, and the county Press has given large publicity to the society's doings. The report was accepted, and president and secretary re-elected.

Leeds.—On September 1, at the Y.W.C.A. Rooms, an address on Esperanto was given to a large audience of "B.P. Girl Guides" and their officers by Miss L. Briggs. Great interest was displayed, and it was decided to commence a course at once under the instruction of Miss Pearson, vice-president of the group. Sixty-two Guides registered their names as students, and promised to attend the class regularly for six months.

Mexborough.—A new course has been started here for the members of the National Union of Clerks, and others. It meets on Tuesday evenings at 8. The instructor is Mr. J. E. Jones. Particulars can be obtained from the secretary, Mr. C. Silverwood, 15, *White Lee-grove*.

Northampton.—Dr. J. Beatty gave a public lecture on Esperanto on September 24 in the Pioneer Lodge Room; it was intended specially for the benefit of the large number of soldiers now resident in the district. As a result many of his hearers, including some soldiers, joined the new season's class. All particulars can be had from the secretary, Mr. J. N. Dickinson, 108, *Clarence-avenue*.

Plymouth.—Nia grupejo nun troviĝas ĉe "Unitarian Chapel, Treville-street," kaj ni kunvenas ĉiun Lundon, Merkredon kaj Vendredon, 7.30 ĝis 9.30 v., kaj kore invitas ĉeesti la samideanojn, kiuj vizitos nian urbon.

La ĉiujara ĝenerala kunveno okazis la 29an de la pasinta monato, kaj elektiĝis la jenaj oficistoj:—

Prezidanto:—S-ro Wm. Walker. Sekretariino:—F-ino E. M. Spry. Kasisto:—F-ino A. Mulkerns.

Lastan monaton vizitis nin S-ro M. Hyde el Aŭstralio; li restis ĉe ni du-tri tagojn kaj la tutan tempon li estis akompanata kaj kondukata tra niaj urboj de samideanoj.

Preston.—En la *Guild Hall*, S-ro Paul Blaise alparoladis grandan aŭdantaron pri "Belgujo antaŭ kaj post la Milito." La aferon, kiu bonege sukcesis, arangis la loka esperantistaro. La urbestro prezidis, kaj donacema sed modesta samideano elpagis la presan kaj reklaman kostojn. Rezultis profito de £62 15s. por la helpmono de la Belgoj. Ankaŭ Esperanto ricevis gravan antaŭenpuson, dank' al la sagacaj aludoj pri la lingvo, de S-ro Blaise, nia nelacigebla propagandisto.—W.H.S.

Sunderland.—The members and friends of this group held their opening meeting of the session in the form of a social evening on October 1. The gathering was held at Rowntree's Café, North Bridge-street. Mr. Arthur Rontree, the class instructor, presided. The secretary (Mr. W. C. Cowley) gave a report on the past year's work of the society, which was very satisfactory in view of the formation only twelve months ago. Mr. Rontree gave an interesting address on Esperanto. He spoke of the growing need of an international tongue, and especially at the present time. Several friends present caught the Esperanto spirit, and are joining the beginners' class. During the evening the musical talent of the class was very prominent.

Torquay.—Our friend R.S. (the author of *Travivajoj*) had the honour to entertain Mr. and Mrs. Blaise at the end of last month, and they seized the opportunity to hold a meeting at the Natural History Society Museum (of which R.S. is a member), for the benefit of the Belgian Relief Fund. The hall was crowded to hear Mr. Blaise's speech on behalf of his countrymen, and as a result of the meeting £50 were sent for the fund.

Two similar meetings were held also at **Exeter**, through the help of R.S. and the local *Samideanoj*, the Misses Cozens, Tattershall, and Shapley. The hall of the Royal Albert Museum was crowded on both occasions, and another £50 was subscribed.

SCOTLAND.

Edinburgh.—At a well-attended meeting of Berwick Arts Club, Mr. J. M. Warden delivered a propaganda address on Esperanto. Much interest was aroused, and good results are expected. Will all "interesatoj" please apply for particulars of proposed class to Dr. Gauntlett, *The Chantry, Berwick-on-Tweed*.

On October 7 Mr. W. M. Page spoke to a large and enthusiastic gathering which had assembled to hear his first presidential address. Mr. Page reviewed the position of Esperanto at the present time, and showed why we were justified in taking a very optimistic view of the situation. At the close of a most helpful speech a satisfactory number of members—old and new—were enrolled, and thus was our new session successfully inaugurated.

On October 14, instead of the Delegates' Annual Report of the International Congress of the year, we listened with much interest to the varied experiences of some of our members who had journeyed to the *Kongresurbo* for the *Deka*. Their descriptions of Paris during the exciting times following the outbreak of war were much enjoyed.

On October 9 Mr. Andrew Wilson delivered a lecture on Esperanto to a deeply interested audience of about 50 in "Woodburn Sanatorium," Morningside. This meeting has already had very satisfactory results.—A. M. C.

Edinburgh Police.—In October the evening classes in Edinburgh re-opened, but among the City Police there were grave doubts as to whether, owing to the war and the number of men off to the Front, there would be any classes for them this session.

Miss A. M. Munro wrote the Chief Constable Ross asking his permission to resume the Police Esperanto Class, and in his reply the Chief Constable said: "Owing to the war, and the number of men engaged on special duty in connection therewith, I will not be able to arrange for the usual educational classes, but am willing that the Esperanto classes should be held, and consequently have given intimation to the members of the Force, in accordance with your letter." The men, as well as their instructress, were more than pleased when the permission was given, and all thoroughly appreciate the value of that permission. The Chief Constable from the beginning has shown great interest in this class, and evidently finds the study of Esperanto beneficial to his men.

On October 1, in Tollcross School, the members for the second stage met. Sixteen were present, and it was delightful to see how these men enjoyed meeting each other again in the old class-room, and Esperanto was the language spoken; they wished to impress on each other that they had not forgotten it.

One of the six officers who were in Paris was not there. Mr. Birnie, detective officer, has joined the Gordon

Highlanders, now at Aldershot. As he has a good knowledge of French, and knows a bit of German as well as Esperanto, he will be of great assistance when he gets to the Front.

A first stage class has begun with twelve members, and it is expected that others may yet be able to join.

This first stage class already shows signs of becoming as enthusiastic as the second stage.

Hamilton.—La anoj de tiu ĉi societo pasigis tre agrablan vesperon Oktobro 22, kiam ili temangis kune en kutima loko—Y.M.C.A., Hamilton. Ĉiuj anoj ĉeestis escepte nur unu, kiu servas nuntempe kun la Kitchener'a armeo. La ĉefurbestro de Hamilton sendis leteron reakceptante la Hon. Prez-econ, kaj esprimante lian daŭran intereson en la societo. Responde al alvoko de la Nederlanda Federacio Esperanta monsumo estas kolektita por helpi la Belgajn forflugulojn en Holando. Ĉiuj anoj estas entuziasmoj kaj la societo nun "iras forte."—G.H.

IRELAND.

Dublin.—Dum la venonta sezono la kunvenoj de la Esperantista Sekcio de la Modern Languages Society, Dublin, okazos ĉiujaude je la 8a vespere anstataŭ vendrede. Ĉiujn sciigojn volonte donos S-ro C. P. Blackham, hon. sek., 14, Garville-avenue, Rathgar.

WALES.

Swansea.—La ĉiumonata kunveno de la Sud-kimruja Ligo okazis en Swansea je la 3a de Oktobro, kiam Pastro W. H. Harris, B.A., B.Litt., prezidis. F-ino Grace Rhys Jones, Cardiff, en bonstila Esperanto, alparolis la kunvenon pri la temo "Al kaj de Parizo." S-ro W. J. Emms sprite kaj interese priskribis sian vivon en la Bermudas. S-ro Lewis Evans, Pontsticill, kiu estas tre agema propagandisto, rakontis siajn spertojn kiel vendisto de *Esperanto for All*. Li jam vendis pli ol du cent. El la anekdotoj de S-ro Evans, la jenaj meritas esti citataj:—"Unu sinjoro, kiun la propagandisto renkontis, diris, "Kion valoras Esperanto al mi? Mi jam scias paroli angle, kimre, france kaj germane, kaj konas iomete la italan, hispanan, portugalan kaj kelkajn aliajn lingvojn. Nu, kion valoras Esperanto al mi?" "Nenion, Sinjoro," respondis S-ro Evans. "Vi sentus vin hejme, eĉ en la Turo de Babelo."

Tamen la lingvisto aĉetis unu, kaj poste ankoraŭ kvin, kiujn li disdonis al siaj amikoj.

Unu tagon S-ro Evans preterpasis tri virojn, kiuj parolis pri "Betting Systems." Li salutis ilin kaj diris "Cu vi konas la *Esperanto for All* system? Tiu ĉi broshuro tute klarigos ĝin—'a winner every time.'" Ili aĉetis.—Poste temango kaj neformala koncerto, kiam Pastro Harris, S-ino Jones, F-ino Jones, S-ro Jones kantis, kaj S-ro Yarworth, Del., U.E.A., en Grimsby, majstre ludis je la fortepiano. La plej proksima kunveno okazos en Cardiff je la komenco de la Nov-jaro.

GENERAL.

British League of Postal Esperantists.—With regret we announce the death of S-ro S. M. Gray, a reservist of the Dorset Regiment, and one of the first to be called up for the war. His death is a very great loss to the League, for he was the very man for the propaganda of Esperanto in the Post Office. The new secretary, S-ro G. E. Ore, Western District Office, *Wimpole-street, London, W.*, believes there are still many *Samideanoj* who are not yet members of the B.L.P.E. He earnestly appeals to them to join. *Unity is Strength.*

La Nova Rolo de S-ro Blaise.—Lumbildaj paroladoj Pri kaj Por la Belgoj (Esperanto propagandiĝas ĉie, samtempe), jam okazintaj :—Camberwell, Camden Town, Torquay, Exeter (2), Leigh, Eccles, Preston, Conway, Llandudno, Deganwy, Finchley, Coventry, Redhill, Wood Green, Worcester, Croydon. Ĝis parolado en Wood Green kolektiĝis proksimume £700.

Tiaj kunvenoj okazos en East Grinstead, Greenwich, London Esperanto Club, Heaton Moor, Didsbury, Oldham, Eccles, Rusholme antaŭ la fino de la monato.

Poste okazos kunvenoj en Penmaenmawr, Novembro 2; Colwyn Bay, Novembro 3; Bangor, Novembro 4; Carnarvon, Novembro 5; Denbigh, Novembro 6; tiam Stoke Newington, Novembro 7; Royston, Novembro 12; Birmingham, Novembro 14; kaj Accrington, Novembro 16. Aliaj urboj en Lancashire saman semajnon eble, kaj Finchley, Novembro 23, kaj Bath, Novembro 24 kaj 25. Poste Bognor, Decembro 2, kaj aliaj en tiu regiono, fine Kensington, Decembro 7.

Kelkaj aliaj jam aranĝigas, sed datoj ne estas certe fiksitaj.

Datoj restas havigeblaj post Decembro 8, sin turni al S-ro P. Blaise, 125, *Hambalt-road, Clapham, S.W.*

La granda kaj surpriza sukceso de la paroladoj estas ŝuldata plejparte al la sindonemo de lokaj Esperantistoj kaj aliparte tre ofte al fervoraj amikoj de la Svedenborga Eklezio.

La B.E.N.A. kaj Esperanto.—La Sekcio Esperantista de tiu ĉi societo (BRITISH EMPIRE NATURALISTS' ASSOCIATION) nun progresas tre bone. Dek du personoj ĝis nun skribis al mi. Baldaŭ ni intencas havi Rondiranton, en kiu ĉiu membro skribos ion pri la naturo. Mi ree petas, ke ĉiu leganto de tiu ĉi gazeto, kiu interesigas pri la naturo aŭ scienco, skribu al mi por detaloj pri tiu ĉi sekcio.—ERIC BIDDLE, B.E.N.A., "Selborne," *Western-road, Wylde Green, Birmingham.*

Dankesprimo.

NEWCASTLE, la 3-an de Oktobro, 1914.

Revenante Rusujon post 2-monata restado en Anglujo, kie mi estis devigata halti post la neokazinta X-a Kongreso Esperantista, mi konsideras kiel mian agrablan devon esprimi la plej koran dankon al ĉiuj miaj anglaj amikoj, precipice al F-ino M. L. Blake, el Londono, por la bona akcepto kaj eksterordinaraj servoj, montritaj al mi dum mia haltado en Anglujo.—Ne povante kun ĉiuj persone adiaŭi, mi per BRITISH ESPERANTIST direktas al ili sincerajn salutojn kaj "adiaŭ."—REGINA KOPF, Kališ (Rusa-Polujo).

Press Cuttings Classified.—August.

Articles or Paragraphs about Esperanto appeared in:—*Montreal Daily Star*, April 25; *Bradford Daily Telegraph*, July 25; *Daily Graphic* (Bus Interpreters); *Dorking Advertiser*, August 1. *Re Congress experiences in following*:—*Southport Guardian*, 1st; *Southport Visitor*, 1st and 18th; *Sheffield Daily Telegraph*, 3rd, 4th, and 5th; *Kettering Guardian*, *Carmarthen Journal*, 7th; *Barnes and Mortlake Herald*, *Croydon Advertiser*, 8th; *Yorkshire Observer*, 10th; *North Middlesex Chronicle*, 29th.

Regular Articles appeared in:—*Christian Commonwealth*; *Cheltenham Chronicle*; *Hastings Observer*; *Barrow Guardian*, and *Illustrated Chronicle*.

Esperanto Activities reported in:—*Birmingham Post*, 29th.

Letters in Support of Esperanto appeared in:—*Red Lamp*, Simla, India ("Timulo" on "A Lover's Quandary"), June; *Teesdale Mercury* (Paris Congress Experiences, by E. Andrews), 12th.

German Government "News" in Esperanto.

Esperanto has won a new disciple. It is the biggest capture that this international language, hitherto the hobby of a handful of pacifists and similar enthusiasts, has yet made. For the new disciple is the German Government itself. It has been recognised in Berlin that—unlike French or English—German is not a world-tongue; that it is difficult to learn, and that it is not understood as a rule in neutral countries. It has also been recognised that though only a few people can read Esperanto, anybody can learn to read it in a few hours or even minutes. Consequently, Dr. Zamenhof's artificial key-language has been adopted in the systematic German campaign for the enlistment of the sympathy of neutral countries. We have received a batch of Esperanto leaflets issued by the German Government for distribution in Sweden, Norway, Italy, Spain, etc. They are beautifully printed on excellent lemon-coloured paper, and are headed:—

LA EŪROPA MILITO.

GERMANAJ OFICIALAJ RAPORTOJ ESPERANTIGITAJ.
SCIIGOJ DE L' GERMANA KAJ AŪSTRA ĈEFSTABOJ.

They consist of the daily war bulletins of the German and Austrian headquarters staffs. The German bulletins bear the signature of General-Quartermaster von Stein; the Austrian that of Major-General Hoefer.

A separate broadsheet gives what it calls "Koncizaj informoj," in the form of a diary, from the assassination of the Archduke Franz Ferdinand on June 28 up to August 30. Needless to say, it is an unbroken record of German and Austrian successes.

From *The Daily Chronicle*.

Al kelkaj Esperantistoj ŝajne ne plaĉas, ke oni uzas nian lingvon por militaj celoj. Eble la jenaj konsideroj skribitaj de nia prezidanto, Leŭtenanto H. B. Mudie, al skota amiko pri protesto de eminenta franca milita samideano kontraŭ tio, kion li nomas "abomena trouzo de nia kara lingvo, kiu devas resti tute neŭtrala," pli prave opiniigas tiajn samideanojn kaj iomete trankviligos ties sentojn de ofendo:

21. 10. 14.

Mi plene malkonsentas kun via amiko pro la jenaj kaŭzoj:—

1. La civilizita mondo estas nun pro la miliro pli ol iam kunligita, kaj Francoj, Belgoj, Rusoj, Serboj, kaj ĉiuj nur escepte la Germanoj sentas sin pli frate kunligitaj ol iam antaŭe. La ĉefa malhelpo je la efektivigo de tia amikeco estas la lingva diverseco, kaj Esperanto estas tuj triumfonta post, se ne dum, la miliro.

Mia armea kariero komenciĝis sub plej favoraj aŭspicioj, kaj mi jam faris du servojn, unu en Belgujo kaj unu en Francujo, kiuj kondukis min antaŭ multaj ĉefoficiroj. Ofte okazis ebleco por babilado, kaj mi kelkfoje montris la Germanan flavflugfolion kaj parolis pri nia lingvo. Ĉie ekzistis vigla intereso kaj demando pri literaturo, k.t.p.

Tuj kiam mi ricevis la unuan flavan folion, mi skribis al Sir Edward Grey por altiri lian atenton al la afero, kaj por proponi la redakton de flugfolioj aŭ de resumo de la "Blanka Papero" por internacia dissendo; kompreneble, la propono estis kun dankoj malakceptata!

Tamen mi protestas kontraŭ la protesto pri la uzo de Esperanto por dissendi oficialajn sciigojn. Se nia lingvo ne devus esti uzata por tio kaj por kia ajn komuniko, mi vere ne kompresas ĝian utilecon.

La celo de lingvo estas aŭ transdoni aŭ vuali niajn pensojn.

Gi devas esti uzebla kaj por faktoj kaj por mensogoj — aŭ ĝi ne rajtas je la nomo de lingvo: kaj se iu naive kredas, ke nia lingvo nur ekzistas por dissendi informojn, kiuj plaĉas al ĉiu Esperantisto en la mondo, mi ne povos kün tiu konsenti.

Mi estas tute certa, ke via korespondanto neniel volas tion supozigi, kaj eble li, mi, kaj la aliaj armeaj samideanoj iom post iom povos sukcesi enkonduki la oficialan uzon de Esperanto en la kunligitajn armeojn, kaj tiam ni ne estos vane vivintaj.

Vi tre bone scias, ke ĉiuj novaj elpensajoj, kiuj finfine bonfaras al la homaro—ekz. la aviado, telegrafado, k.t.p.—estas unue aplikitaj al militaj bezonoj, kaj ricevas fortan apogon. Tiel estu pri Esperanto, kaj ĉiu Esperantista soldato faru sian modestan laboreron por tion efektivigi.

H.B.M.

El la deklaracio unuanime akceptita en la Boulogne'a Kongreso ni ĉiuj scias, kio estas la *Esperantismo* en rilato praktika: el tiu ĉi deklaracio ni ankaŭ scias, ke "Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas." Esperantisto sekve estas ne sole tiu persono, kiu uzas Esperanton sole kaj ekskluzive por celoj praktikaj; Esperantisto ankaŭ estas persono, kiu uzas Esperanton nur por amuziĝadi. Esperantisto fine estas eĉ tia persono, kiu uzas Esperanton por celoj plej malnoblaj kaj malamaj.

El la parolado de D-ro Zamenhof en la Geneva Kongreso.



United Effort.

There is no doubt that British Esperantists, as a body, will be anxious to do their part in ameliorating the lot of our soldiers at the Front, and also that of such prisoners and refugees as may come under our charge. In that connection I am glad to take the opportunity of letting you know what the MONTROSE ESPERANTO SOCIETY intends to do, and of offering a suggestion in the direction of co-operative effort. We have undertaken that each member of the society shall provide at least *one* suitable garment or other wrap for the use of the soldiers—male members, of course, undertaking to procure such from their lady friends. Now as to the suggestion. I would propose that the President of the B.E.A. should invite all the affiliated societies in the country to do the same, the garments to be collected by each society or group, and sent to the B.E.A. for despatch to their destination. I may add that our group provides from its funds the cost of the wool. Of course, the number of garments cannot under the circumstances be very large, owing to the many organisations (Church, Red Cross, etc.) which are already absorbing the energies of workers; but in the aggregate the effort will count. The number of affiliated groups is 138. Suppose that each of these send an average of 12 articles (which is not an extravagant computation), that would provide 1,656, or nearly, if we omit those groups that are outside the British Isles.

I may mention that when I brought these suggestions before the members of this group they were most cordially received, though every worker was already contributing to the local or national collecting agencies.

I may add that though our group is small in point of numbers, not one will hold back in this effort.

With cordial greetings,

JAMES D. SIMPSON, *President.*

[In the name of our President and Council, we cordially recommend Mr. Simpson's excellent idea to the members of the affiliated groups. The offices, 17, Hart-street, London, W.C., will gladly act as dépôt for the articles sent in by the various groups, and the secretary will in due course see that they are despatched to their proper destination.—RED.]

Tre Grava Alvoko.

NED. FED. ESP. "LA ESTONTO ESTAS NIA."

ROTTERDAMO, la 14an de Oktobro, 1914.

Kara Samideano,—Ne estas necesa, ke ni klopodu pentri por vi la mizerojn kaŭzatajn de la milito, precipe en Belgujo.

En ĉiuj gazetoj, vi ja povas legi pri tio, kvankam la vera situacio ne estas priskribebla de iu.

En nia lando preskaŭ miliono da Belgaj forfluguloj trovis gastejon, kaj kvankam la Holandanoj faras ĉion, kion ili povas (por nomi ekzemplon, la Rotterdama gazeto kolektis inter sia legantaro en tri tagoj pli ol 60,000 guldenojn, kaj tio ne estas sola ekzemplo), la mizero tamen estas grandega.

Estas pro tio, ke la estraro de la "Nederlanda Federacio Esperantista": "La estonto estas nia," decidis envoki la helpon de la eksterlandaj samideanoj kaj peti, ke ili sendu monsumon por la Belgaj militviktimoj. Ĉiu monsumo estos priespondonta en la *Holanda Pioniro*.

Ni petas al ĉiuj, kiuj volas helpi, ke ili sendu la monon al nia kasisto.

Ni restas kun plej koraj salutoj:

La estraro de la Nederlanda Federacio de Esperantistaj Grupoj: "LA ESTONTO ESTAS NIA."

P. J. VERMAAS, *prezidanto.*

J. VAN DE VELDE, *sekretario.*

JAN ZIERMANS, *2a sekretario.*

A. C. VAN DER VET, *kasisto,*

Van Lumeystraat 28, 's Gravenhage, Holando.

Ni tre volonte enpresos liston de monsumoj ankaŭ en nia gazeto kaj malfermas ĝin per donaco de £1, en la nomo de la Redakcio. Sendu do rekte al S-ro A. C. Van Der Vet aŭ al ni.

[Holland, whether giving succour to the fugitive Belgians or attending to the wants of the interned British and German fighting men who have crossed her border, has manifested an impartial kindness and generosity, tempered with thoughtful organisation, that stamps her as the finest exponent of Christian civilisation at the present moment.

The Hon. Sir ALAN JOHNSTONE, British Minister at The Hague, appreciates so highly the attitude of the Dutch Government towards Britain that he authorised me (*The Daily Chronicle's* correspondent, W. Latey) to-day to quote him as follows:—

"In the midst of difficulties of all kinds Holland has loyally preserved faith as a neutral nation with England. Not only that, she has shown those of our forces who have been cast on her shores a degree of kindness and care such as could hardly have been expected.

"When our sailors from the wrecked Cressy cruisers were brought ashore, the Dutch people rushed with one accord to do what they could for the poor fellows, many of whom had suffered greatly from exposure and privation.

"Food, clothes, and even fruit, grapes, and flowers, were showered upon them, and I shall always deeply appreciate the splendid good-heartedness of the Dutch people on this occasion."—From *The Daily Chronicle*, 21. 10. 14.]



Naskigo.

TAYLOR.—Ce 2, Arthur-road, Holloway, London, N., la 8an de Septembro, al Gesinjoroj S. H. Taylor, filino.

La etulino salutas la Geesperantistaron.

Libraro kaj Gazetaro.

Travivajoj de Ro So.—Aperos, la unuan de Decembro, dua korektita eldono de ĉi tiu amuza kaj tre ŝatata verko. Kiom ĉagrenigis nia amiko Richard Sharpe pri la multaj okazintaj en la unua eldono preseraroj, ĉiuj eble bone memoras; la dua montrors per komparo, kiom li penadis, por esti, kiel originale intencita, kiom eble senerara kaj, por ke ne plu okazu diskutoj pri la gramatikaj aŭ stilaj esprimoj. Ro So konsultis la plej altan juĝon, D-ron Zamenhof, kiu aprobis liajn lingvajn konsilojn, kaj tiel faris el la paĝoj 89—95 kvazaŭ aldonon al la konataj "Lingvaj Respondoj de Zamenhof."

La nova libro entenas nun 100 paĝojn, t.e., sep pli ol la unua eldono kaj havas novan amuzan kovrilon. La restaĵo de la unua eldono, 350 libroj, estis sendita al Parizo, kaj tie ili restos ĝis post la milito; kiel komercaĵo ili ne reaperos. La aperontaj 1,000 ekzempleroj ankaŭ estos la lastaj, ĉar ties kompostitajon oni ne povas plu konservi; se iam poste starigus postulo, povas esti, ke la B.E.A. represigos malkaran neluksan eldonon, sekve tiuj, kiuj dezirus posedi la nunan vere fidindan verkon, aĉetu antaŭ ol la eldonajo elvendigos. La B.E.A. jam akceptos mendojn.

La Forto de la Fortaj, de *Jack London*, kun permesso de l' aŭtoro tradukis el angla lingvo, *Karl Fröding*; eldonis W. Nutters en Amsterdam; prezo ĉe la B.E.A., 2s. Jen bonega socia alegorio en formo de historieto trita el la provoj de sovaĝa gento al komunuma organizo. Bedaŭrinde estas, ke la rakonto, kvankam montrante tre sprite la paradoksajn ecojn de nia moderna civilizacio, ne montras al ni la vojon de forsalvo el niaj sociaj malfacilajoj. En ĉi tiu tragedia tempo ni sentas nur tro akre, ke la homaro estas implikita en reton da pereigaj moroj kaj eraraj opinioj, kaj danke ni bonvenigas ĉion, kio emas konvinki la mondon pri tio; tamen kun sento de caĝreno ni aŭskultas mediciniston, kiu lerte diagnozas nian malsanon kaj—tuj foriras ne preskribinte la taŭgan kuracilon.—A.E.W.

La Mizeruloj (*Les Misérables*), de *Victor Hugo*, esperantigis *Centezimala*, la dua duono de l' unua volumo (supozeble la dua dekono de la tuto), eldonis W. Nutters en Amsterdam; prezo ĉe la B.E.A., 1s. Kiel ni diris pri la unue aperinta parto (vidu en B.E. de lasta Junio), la lingva stilo de tiu ĉi dua parto estas ĝenerale bona, tamen ankoraŭ al ĝi mankas io ĝis la klasika tono. Tion dirinte, ni elcerpis nian nefavoran kritikon kaj bonvenigas ĉe ni tiun novan pecon de verko ĉiam tre leginda kaj precipice taŭga por la nuna situacio. Ĉu do estas la nuna tempo oportuna por legifikcian verkon pri mizeruloj, kiam la koroj de la tuta mondo estas ĉiuore ŝirataj per teruregaj realajoj? Ĉu meze de universala ruinigo kaj frakasitaj idealoj oni povas aŭ volas legi pri imagaj suferoj? Jes, ĝuste nun tia legajo povas helpi, ĉar ĝi estas verko de genia pensulo, kiu mem travivis teruran tempon kaj tamen ne perdis la esperon, ke fine la bono, la saĝo kaj la amo fine venkos la malbonon. Lia fikcia verko estas resumo de observoj realaj; li verkis ne por amuzi, sed por gvidi niajn pensojn; li estis majstro, kaj se ni saĝe lin legos, ni ricevos bonon.—A.E.W.

The European Review.—This review will be started on January 1, 1915, with the following objects:—

(1). To study the economy, development and national policies of all European countries.

(2). To trace from month to month the main events in international relations, and to present the sociological aspect of national development.

(3). To record the most important achievements in international literature and art.

(4). To examine and encourage the forces which make for international amity and co-operation.

While *The European Review* will strongly advocate the principle of nationalities as essential to human progress, yet nothing but good can result from an intelligent interest in the policies, literature, and science outside one's own country. It is expected that the present war will stimulate greater public interest in these questions, and *The European Review* is being started to supply this new demand.

Contributors will only be drawn from amongst those who have expert knowledge, and articles will be written in English and French, which are recognised as international languages. As an experiment, the editorial will be written in English and Esperanto.

The European Review will at first be issued as a six-weekly, at 2s. 6d. per issue or £1 per annum. The first 500 subscribers will receive the *Review* for the first year at the reduced price of 1s.

Those who are interested in furthering this scheme and sympathise with the objects in view are invited to communicate with "East and West, Ltd., 3, Victoria-street, S.W."

JOHN POLLON, C.I.E.
JOHN STEAD.



Chinese and Esperanto.

DUBLIN UNIVERSITY FUH-KIEN MISSION (C.M.S.).

TRINITY COLLEGE, FUH-CHOW, SOUTH CHINA.
September 4, 1914.

It is often said that it would be impossible for a Chinese to learn Esperanto, because he is unacquainted with the root words on which the language is built up. Indeed I myself thought that it would be necessary at least to learn English first.

I have had to alter my own opinion during the past week, and perhaps the following facts may go far to alter the opinions of others who have held a similar belief to my own.

Some ten days ago I unexpectedly received a letter in simple but perfect Esperanto, addressed to me by a Chinese gentleman of whom I had never before heard. He wrote to say that he had believed himself to be the only person in the Fuh-Kien Province interested in the movement, and his joy was great to know that there was at least one other. Would I be so kind as to write to him. I replied, saying that I should be very glad to meet him, and that my wife and I invited him to tea the following day. He replied in Esperanto, accepting. I looked forward to the meeting with no little curiosity and anxiety. I had discovered that he could speak no English, and as I do not speak Mandarin Chinese, and had never in my life spoken Esperanto, it was a bit nervous work. He arrived in due time, and made a low bow; then we shook hands, and we sat down to tea. It was also his first attempt to speak Esperanto, and it would be an exaggeration to say that the conversation was brilliant, but still we managed to understand one another, and when we met again at tea a few days later we really got along quite fairly. I found out that my friend, Mr. Pang, is a gentleman of considerable position and wealth, and that he is preparing a Chinese and Esperanto Grammar at his own expense. He is also interested in Christianity, and asked me to order him an Esperanto New Testament. On leaving the summer resort where I met him, he sent me a basket of fruit, with his card and address in Foochow, and I have promised, when term

opens, to meet a number of his friends, with the idea of possibly starting a little Esperanto group among the Chinese in Foochaw. He has also promised to visit us, and to come some Sunday to our school chapel service.

I mention this case because it is, I think, a remarkable one. This gentleman knows no English, and has only been studying Esperanto for ten months. How he has got on as he has is to me amazing; he has learned through a correspondence class, which has its centre in Shanghai. Many have said to me, "Of what use is it to learn Esperanto out in China?" and I can now say, "Well, it has brought me into friendly touch with at least one Chinese gentleman, whom otherwise I certainly should never have met, and had I met him, I could not have spoken to him." That may not seem very much, but it is something, and it may lead to more. Should it do so I shall again trouble your generous columns.

W. S. PAKENHAM-WALSH.



Du Novaj Vortlistoj.

Laŭ la raporto de Prof. Th. Cart, kiu troviĝas kiel dua aldono al la Raporto de S-ro Boirac al la Deka Kongreso, ni kun plezuro konstatas, ke la Akademio Esperantista kaj la Lingva Komitato tute ne vane laboris dum la pasinta jaro. La du vortlistoj, tie traktataj, montras, ke la Lingva Komitato (kun sia Akademio) posedas ĝustan komprenon pri sia propra rolo kaj klopojas por servi al la Esperantistaro laŭ la plej utila maniero.

Eble kelkaj povas senpripense supozu, ke la propra ofico de la L.K. estas tio, fabriki novajn vortojn por la lingvo kaj malpermesi la uzadon de vortoj, kiujn ĝi ne aprobas; sed tia supozo estus tute erara. La lingvo Esperanto jam ne estas farota: ĝi ekzistas kaj vivas, kaj ĝi devas evolui sammaniere kiel ĉiuj aliaj vivantaj lingvoj. Trudi dekretojn al la uzantoj de la lingvo neniu povus, pro tio, ke ĉiu homo estas libera, ĉu malakcepti la dekreton, aŭ tute forlasi la uzadon de la lingvo. Tamen ekzistas iu forto pli deviga ol kiu ajn lega aŭtoritato, por influi sur la animon de la publiko, nome la deziro kompreni kaj esti komprenata per la komuna lingvo. Por kompreni, estas necese, ke oni eksciu la vortojn apartenantajn al la lingvo; kaj por esti komprenata, estas necese, ke oni ekzercu kun modereco kaj diskreto sian rajton pri la uzado de novaj vortoj. Kaj ĝuste en tiuj rilatoj la L.K. povas kaj celas fari al ni ĉiuj gravajn servojn. Ĝi povas, per esplorado en nia literaturo kaj aliloke, konstati, kiaj vortoj efektive alvenis en nian lingvon por tie resti; kaj plie ĝi povas de tempo al tempo doni sian saĝan konsilon, sed neniam dekreton, pri la dezirindeco de apartaj formoj aŭ esprimoj. La L.K. estas la sindonema kaj volonta servanto de la publiko, kaj ĝia tuta

aŭtoritato logas en la sincereco de ĝia servemo. Same la Akademio estas servanto de la L.K., por kiu ĝi preparadas la laboron; kaj plej honorindaj estas tiuj homoj, kiuj la plej multe servas, direktante la laborojn de tiuj du korporacioj. La Esperanta organiza estas fondita en amo al la lingvo kaj sindonemo por la frataro; kaj nepre fine venkos, spite ĉiuj malhelpoj, ĉiu afero bazita sur tiaj principoj.

La aluditaj du vortlistoj apartenas al du apartaj kategorioj. Unu konsistas el 476 vortoj, kiuj pro sia internacieco jam de la komenco apartenis al Esperanto laŭ §15 de la Fundamento. Pri tiu listo Profesoro Th. Cart raportas jene:—

Rilate al la publikigo mem de iu listo de "internaciaj vortoj," ĝi ŝajnis senutila al kelkaj kolegoj. Kaj vere estas, ke ne apartenas al la L.K. "oficialigi" tiajn vortojn, kiuj per si mem (laŭ §15) estas jam esperantaj. Aliparte, ĉar fatale ne plena, tia listo ne estas, nek povas esti limiga: de neniu ĝi forprenas la rajton uzi vortojn internaciajn, kiujn ĝi ne entenas. Sed, ne "oficialigante" tion, kio ne bezonas "oficialigon," tamen ŝajnis utile kaj eĉ necese, liveri al tiuj, kiuj ne povas per si mem juĝi, ĉu vorto estas internacia aŭ ne, sufice plenan liston de vortoj, kiuj troviĝas ne nur en ilia nacia vortaro, sed en ĉiuj vortaroj, kaj estas jam komune uzataj de niaj plej bonaj verkistoj.

Supozeble la vortaristoj de nun distingos tiujn 476 vortojn per aparta signo en la pressado de sekventaj eldonoj.

La dua listo konsistas el 110 vortoj, pri kiuj la L.K. konstatis, ke ili fakte estas Esperantaj vortoj, ne pro sia internacieco, sed pro tio, ke ili estas komune uzataj de la Esperantistoj. La listo ne estas represita kun la aludita raporto, sed ĝi estas ricevebla per la forstrekado de dek vortoj el la listo presita en *Oficiala Gazeto*, N-ro 62 (Januaro, 1914). La dek forprenataj vortoj, kiujn ree esploras la Akademio, estas la jenaj: *abituriento, arbitracio, cirkuli, feŭdala, goeleto, hirurgo, hirurgio, karbunkolo, rostbefo, tercio*. La plimulto el la 110 nove-oficialigitaj vortoj estas bone konataj al tiu, kiu konstante uzas la lingvon kaj legas ĝian literaturon; kaj multaj eĉ havas tiel familiaran aspekton, ke oni miras, kial ili ne trovis lokon en la oficiala "Unua Aldono." Tamen mirante oni devas ankaŭ aprobi la singardemon de la L.K. La pli malnovaj Esperantistoj bone memoras la tempon, kiam por *braceleto* oni diris *cirkau mano*; por *diasfana*, *travidebla*; por *eburo*, *elefantosto*; sed ni povas gratuli nin, ke hodiaŭ ni jam ne devas uzi *cirkau-esprimon* por *incenso*, *lukti*, *milda*, *robo*, *stulta*, *tramo*, *klingo*, *akuta*, *atlaso*, *k.t.p.*

Respondo Teologia.

Jen traduko de la respondo farita de la Ĉefepiskopo angla kaj aliaj eminentaj ekleziuloj kaj laikuloj de la anglikana eklezio kaj de la diversaj sektoj nekonformaj, al la alvoko farita de teologoj germanaj "al la alilandaj Kristanoj evangeliaj" :—

Cirkuliĝis en Anglujo kaj, ni kredas, en Ameriko, unu dokumento en la formo de alvoko rilatanta al la Eŭropa Milito, direktita al "la alilandaj Kristanoj evangeliaj," kun aparta aludo pri la anoj de la Tutmonda Misiista Konferenco en Edinburgo. Ĝi portas la subskribojn de fratoj kaj amikoj niaj propraj en la Eklezio de Kristo—viroj, pri kies honesteco, kapableco kaj sincereco oni eĉ ne povas imagi dubon, kaj kies nomoj havas tra la tuta mondo gravan signifon inter tiuj, kiuj pensas aŭ instruas aŭ preĝadas.

Miregigas nin tio, ke tiuj, kiuj okupas la lokojn tenatajn de la subskribintoj de tiu alvoko, povis permesi al si fari, pri la politikaj kaŭzoj de la Milito, aserton, kiu tiel strange diferencas de tio, kio sin prezentas al ni kiel la evidentaj faktoj de tiu ĉi grava horo en la Eŭropa historio. Per malmultaj vortoj ili iel rakontas pri la okazintaj de ĵus pasintaj monatoj aŭ jaroj, sed pri la plej elstarantaj faktoj, el kiuj naskiĝis la Milito, ili neniel aludas.

Ne kun facila animo ni estas konsentintaj je la agado de l' Registaro de nia lando rilate la aferon. Sed la faktoj koncernaj, kiel ni ilin konas, malebligis al ni fari alimaniere. De tiuj faktoj ni proponas ĉi tie mallongan, tamen serioze redaktitan, resumon ĉerpitan el la oficialaj paperoj, kies fidindeco staras ekster ĉia dubo. Estas sur tiujn faktojn, ke ni apogas nian plej certan konvinkon pri tio, ke, ĉe homoj dezirantaj akcenti la ĉiodevigan devoſuldon de fideleco al metita promeso kaj la devon, defendi la malpli fortajn naciojn kontraŭ perforto kaj ofendo, ekzistis nenia alia agmaniero iel farebla ol ĝuste tiu, kiun nia lando alprenis.

La 24an de Julio, Sir Edward Grey diris al la Germana Ambasadoro, ke: se la Aŭstrio ultimato ne kondukos ĝis malakordo inter Aŭstrio kaj Rusujo, tiam li kun ĝi ne havas koncernon. Li proponis, ke la kvar Potenco: Germanujo, Italuo, Francujo kaj ni mem, samtempe interagadu en Vieno kaj en Peterburgo celante al modereco en la okazo se la nterrilatoj de Aŭstrio kaj Rusujo farigos minacantaj. [Correspondence respecting the European Crisis, White Book, Cd. 7467, No. 11]. La Germana Ŝtatministro diris (25 Julio), ke li estas tute bonvola por konsenti tiun proponon [N-ro 18].

Kiam la respondo de Serbujo estis malakceptita de Aŭstrio, Sir E. Grey proponis (26 Julio), ke la Ambasadoroj Franca, Itala kaj Germana tuj vizitu lin "en la celo malkovri rimedon, por malhelpi komplikajojn" [N-ro 36]. La respondeco pri la malprospero de ĉi tiu propono kuſas sole sur Germanujo, kiu sola metis kontraŭparolojn. Dum ĝi favoris "principe" pacperadon inter Rusujo kaj Aŭstrio, la Germana Registaro tamen ne povis aprobi ĝuste la proponitan konferencmetodon, sed, kvankam invitite tiel fari, ĝi elmetis nenian alternativan proponon.

Fine, en la tutlasta momento, Sir E. Grey faris novan ekprovon al la konservado de paco: "Mi diris al la Germana Ambasadoro hodiaŭ matene (31 Julio), ke, se Germanujo povos elmetigi kian ajn racian proponon, kiu klare montrus, ke Germanujo kaj Aŭstrio klopodas pri la konservado de l' Eŭropa paco kaj ke Rusujo kaj Francujo agus senprudente, ĝin malakceptante, ĝin mi subtenos en Peterburgo kaj Parizo, ĝis tio irante, diri, ke, se Rusujo kaj Francujo ne akceptos ĝin, la Registaro de Lia Reĝa Moſto jam ne koncerniĝos je la rezultatoj; sed aliokaze, mi diris al Germana Ambasadoro, se Francujo implikiĝos, ni estos entirataj" [N-ro 111].

Nenio povus pli klare montri, ke nia Registaro penegis ĝis ekstrema limo por konservi la pacon de l' Eŭropo, kaj ke ĝi ne ricevis en sia klopodo la kunagadon de la Germana Registaro.

La efektiva sin-intermeto de Britujo en la nunan Militon rekte devenis de la demando pri la neŭtraleco de Belgujo.

La unua garantio pri la neŭtraleco de Belgujo estas trovebla en Artikolo VII. de la Traktato Londona (19 Aprilo, 1839), farita inter Anglujo, Aŭstrio, Francujo, Rusujo kaj Prusujo unuflanke, kaj aliflanke Nederlando.

Tiu Artikolo legiĝas jene: "Belgujo konsistigas per si Ŝaton sendependan kaj ĉiam neŭtralan. Ĝi estas sub devoſuldo observi tiun neŭtralecon kontraŭ ĉiuj aliaj Ŝtatoj." Ĉe la ekflamiĝo de la Milito Franca-Prusa en 1870, tutsamaj traktatoj inter Anglujo kaj Francujo kaj inter Anglujo kaj Prusujo, tiu ĉi aganta por si mem kaj siaj Kunliganoj, estis subskribataj en Londono. Tiuj Traktatoj estis ambaŭkaze antaŭirataj per formala Deklaracio flanke de la militantaj Potenco, ke ili dece observos la neŭtralecon de Belgujo.

La Prusa Komuniko speciale diris, ke la Prusa Registaro konsideras tian Deklaracion superflua en rigardo al la ekzistantaj Traktatoj. La Traktatoj de 1870, cetere, speciale rekonis kiel ligoforta la Artikolon VII. de la

Traktato de 1839. La Traktatoj kondiĉigas, ke en la okazo se unu militanta partio observos kaj la alia perfotos la neŭtralecon de Belgujo, la Unuigita Regno kunagos kun tiu militanta partio, kiu observos la neŭtralecon, kontraŭ la alia.

La tria Artikolo de la Traktatoj kondiĉigas, ke ĝi estos ligoforta por la kontraktantaj partioj en la daŭro de la milito kaj poste por dek du monatoj, "kaj post la forpaso de tiu tempo la sendependeco kaj neŭtraleco de Belgujo, laŭ kiom koncernas respektive al la altaj kontraktantaj partioj, restos apogataj, kiel antaŭe, sur la Kvinopan Traktaton de 1839."

Tiel kuſis sur Germanujo, ne malpli ol sur Anglujo kaj Francujo, la devoſuldo observi, konforme je la traktatoj de ĝi subskribitaj, la neŭtralecon de Belgujo. Responde al unu demando metita de la Brita al la Franca kaj Germana Registaroj, la 31 Julio, kiam la ekflamigo de militagado ŝajnis tuj minacanta. Francujo donis certigon, ke ĝi dece observos la neŭtralecon de Belgujo. Germanujo donis nenian tian certigon, kaj nia Ambasadoro konkludis el io, kion diris la Ŝtatministro: "ke tiu opinias, ke ĉia responde, kiun ili povus doni, ne povus ne malkaſi certan ion el ilia plano de militado, se eventuale sekvos miltito." [N-ro 122]. La trian de Aŭgusto, ultimato estis direktita al Belgujo de la Germana Registaro, kies esenco estis, ke Belgujo estos traktata kiel malamiko, se ĝi ne konsentos je la perfotado de sia teritorio, permesante la trapason de Germanaj soldataroj al Francujo [N-ro 153]. Tion kategorie rifuzis la Belga Registaro, kiel monstran atencon kontraŭ la Komune-nacia Leĝaro. Tiun opinion pri la agado de Germanujo subtenas ankaŭ la parolo de la Kanceliero antaŭ la Reichstag, 4 Aŭgusto; ĉar, parolinte pri "la prava protesto" de Belgujo, li aldonis: "La maljustaĵon—mi parolas malkaſe—kiun ni faras, ni penos rebonigi, tuj kiam nia milita celo estos atingita."

Germanaj eldonajoj, oficialaj kaj neoficialaj, post la efektivigo de la limofendo, estas dirintaj, ke la Belga teritorio estis perfotita nur post kiam la Belgoj konsentis permesi al la Francoj tramarſi, per tio "nuligante la neŭtralecon." Tiuj ĉi asertoj estas elmetitaj tute sen ia provo por subteni ilin per atesto; ili estas kontraŭdiraj al la firmaj pledoj prezentitaj de Germanujo en la tempo mem, kaj ili rekte konfliktas je la garantio donita de Francujo al Sir E. Grey: ili estas tute senbazaj kaj malveraj.

Konvenas, ke ĉe tiu ĉi punkto ni aludu pri "la forta logopropono pri Brita neŭtraleco," pri kiu raportas la Brita Ambasadoro en Berlin, ke ĝin faris al li la Imperia Kanceliero la 29 Julio [N-ro 85]. Respondante ĝin en la morgaŭa tago, Sir E. Grey skribis jene: "La Registaro de Lia Reĝo Moſto ne povas por unu momento konsideri la proponon de la Kanceliero: ke ĝi sin ligu al neŭtraleco sub tiaj kondiĉoj. Kion li efektive petas de ni, estas tio, flanke stari dum Francaj kolonioj estus kaptataj kaj Francujo estus venkata, tiel longe dum Germanujo nur ne forprenos Francan teritorion propran kaj ne kolonian. Laŭ la materiala vidpunkto, tia propono estas neakceptebla; ĉar Francujo, kvankam ne suferante la pluan forprenon de teritorio en Eŭropo, tamen povus esti tiel dispremita, ke ĝi perdu sian situacion kiel Grava Potenco kaj fariĝus submetita al Germana politiko. Tute aparte de tio, estus honto al ni, fari tiun marĉandon kun Germanujo je la kosto de Francujo: honto, post kiu la famo de tiu ĉi lando neniam reboniĝus. La Kanceliero ankaŭ efektive petas nin formarĉandi kion ajn ni havas da devoſuldo aŭ intereso rilate la neŭtralecon de Belgujo. Ankaŭ tian marĉandon ni ne povus konsideri." [N-ro 101].

La faktoj ĵus resumitaj estas laŭ nia kredo nekontraŭstareblaj. Ni nur povas supozi, malgraŭ ĉia neverŝajneco, ke tiuj honorindaj kaj altkapablaj viroj, kiuj subskribis la Germanan Alvokon, estis nesciantaj pri la devoſuldoj, per kiuj ni estis legitaj, kiel ankaŭ pri la historio de la negocadoj. La malplenumo de tiaj promesoj niaflanke estus ago de la plej malinda perfido.

Kiam ni nin turnas al la ĝeneralaj, kiujn la dokumento entenas, pri la Germanaj pensado kaj politiko kaj planoj, vane ni serĉas kiun ajn aludon pri la doktrino de tiaj verkistoj, kiaj Treitschke kaj Bernhardi.

Ĉu tio signifas, ke la subskribintoj de la Germana Alvoko opinias nekalkulindaj tiujn kondukantojn kaj instruantojn; aŭ ĉu, ke ilia propra kontraŭstaro al la enhavo de tiuj vaste legataj libroj estas tiel bone konata, ke ne necesas akcenti ĝin? Tion ni ne scias. Sed la nuntempaj aktualaj, kiel ilin prezentas la resumo donita de ni ĉi-supre tiel klare respondas je tio, kion instruas kaj emfaze predikas tiuj verkoj, ke almenaŭ por ni estas neeble, ne kunigi la unu kun la alia.

Cetere, ni ne povas silenti pri la aserto de la manifesto, nome, ke "terurajoj nepriskribblaj estas atence faritaj sur Germanojn pace logantajn alilande." Pri kio povas aludi la sub-

skribintoj per tiu ĝenerala aserto, ni ne scias; tamen bone konvenas al ni paroli pri tio, kion ni persone scias. En tiu ĉi lando pacemajn kaj bonkondutajn Germanojn oni traktadas kun afableco kaj mildeco kiel eble plej grandaj; kaj la Ministro de l' Internaj Aferoj estas preninta ilin sub sian propran protekton.

Dio scias, kion signifas por ni, esti dum kelka tempo disigitaj per tiu ĉi granda milito for de multaj homoj, kun kiuj ni havis la privilegion—kaj ankoraŭ denove ni ĝuos, espereble, tiun privilegion—kunlabori al la antaŭenigo de l' Kristana sciigaĵo en la homaro. Per la tuta koro ni kunigas nin kun niaj fratoj Germanaj por bedaŭregi la funebrajn efikojn de la Milito, kaj precipe tiun efikon, ke ĝi deflankigas la energiojn kaj rimedojn de la Kristanaj nacioj for de la grandaj konstruaj taskoj, providence al ili destinitaj, favoraj por la popoloj de Azio kaj Afriko.

Sed estu nenia malkompreno koncerne nian propran situacion. Sopirante al la paco, unuarangaj por ĝin helpi laŭ kiom ni nur povas, fervoraj precipe por protekti la intiman kunulecon de Germanujo kaj Anglujo, ni estas tamen devigitaj deklari, ke, kvankam karega por ni estas la paco, tamen ankoraŭ pli karaj estas la principoj de la vero kaj la honoro.

Se ni estus agintaj alimaniere, ol ni faris, tio signifus intencitan malfidelecon al promeso, al kiu ni estis solene-nin ligintaj, kaj malakcepton de niaj respondecoj kaj devoj rilate la konservadon de la komune-Eŭropa legaro. Ni staras por internacia konfidindeco, por la gardado de la malpli grandaj nacioj, por la subtenado de la esencaj kondiĉoj de frateco inter la nacioj de la mondo.

(Subskribis :)

Randall Cantuar (Ĉefepiskopo en Canterbury).

Cosmo Ebor (Ĉefepiskopo en York).

J. B. Armagh (Ĉefepiskopo en Armagh).

A. F. London (Episkopo de Londono).

Edw. Winton (Episkopo de Winchester).

Walter J. F. Robberds, Episkopo de Brechin, Primus de la Episkopa Eklezio en Skotlando.

J. H. Ossory (Episkopo de Ossory).

Balfour of Burleigh, Prezidanto de la Tutmonda Misiista Konferenco en Edinburgo.

F. C. Burkitt, D.D., F.B.A., "Norris" Profesoro de Teologio, Cambridge.

R. J. Campbell, M.A., Pastro de la City Temple, Londono.

John Clifford, D.D., eks-Prezidanto de la Baptist Union of Great Britain and Ireland.

W. T. Davidson, D.D., Kolegiestro de Richmond Wesleyan Methodist Teologia Kolegio.

P. T. Forsyth, D.D., Kolegiestro de Hackney Theological College.

T. R. Glover, M.A., Profesoro en la Klasiko, St. John's College, Cambridge.

Evelyn R. Hassé, D.D., Episkopo de la Moravia Eklezio.

H. Hensley Henson, D.D., Dekano de Durham.

H. Scott Holland, D.D., Reĝa Profesoro de Teologio, Oxford.

Robert F. Horton, D.D., eks-Prezidanto de la Congregational Union of England and Wales.

W. R. Inge, D.D., Dekano de la Katedralo St. Paŭlo.

M. R. James, Litt. D., F.S.A., Provosto de la Reĝa Kolegio, Cambridge.

J. Scott Lidgett, D.D., Kuna Hon. Sek. de la Nacia Konsiligo de la Liberaj Eklezioj Evangeliaj. Kun-Redaktoro de *The Contemporary Review*.

T. M. Lindsay, D.D., LL.D., Estro de la Kolegio de la Unuigita Libera Eklezio, Glasgovo.

F. B. Meyer, D.D., Kuna Hon. Sek. de la Nacia Konsiligo de la Liberaj Eklezioj Evangeliaj.

G. Campbell Morgan, D.D., Pastro de Konsigacia Preĝejo en Westminster.

James Hope Moulton, D.D., D. Litt., D.C.L., D. Theol., Berlin, Prof. en Universitato, Manchester.

W. Robertson Nicoll, LL.D., Redaktoro de *The British Weekly*.

W. P. Paterson, D.D., Profesoro de Teologio en la Universitato de Edinburgo.

Arthur S. Peake, D.D., Profesoro "Rylands" de Biblia Ekzegezo, Victoria Universitato en Manchester.

William Ramsay, D.D., LL.D., F.B.A., Universitato de Aberdeen.

J. Armitage Robinson, D.D., F.B.A.

H. E. Ryle, Bishop, D.D.

Michael E. Sadler, C.B.

W. Sanday, D.D., F.B.A.

W. B. Selbie, D.D.

J. H. Shakespeare, M.A.

George Adam Smith, D.D., LL.D., F.B.A.

Eugène Stock, D.C.L.

T. B. Strong, D.D.

H. B. Swete, D.D., F.B.A.

Alexander Whyte, D.D., LL.D.

A. Wallace Williamson, D.D.

F. Luke Wiseman, B.A.

Esperantaj Verkoj Rekompencitaj de la Akademio.

En *Oficiala Gazeto*, N-ro 68, sub dato 25 Julio, en la aldonoj al la Raporto de S-ro Boirac al la Deka Kongo, troviĝas la jena tre interesa raporto :—

Estimata Sinjoro Prezidanto,

Kun bedaŭro la Akademio konstatis, ke tre malmultaj estis la prezentitaj verkoj. Niaj eĉ plej gravaj firmoj kaj plej rajte famaj verkistoj sin detenis—sendube pro neatento aŭ nescio—de ĉiu prezentado.

Sajnis tamen bone al la Akademio rekompenci jam nun kelkajn el la *regule* proponitaj libroj, kun la espero altiri tiamaniere la atenton de la interesataj personoj.

Gi estus feliĉa, se proksiman jaron multaj estus la kandidatoj, kaj precipe, se gravaj ili estus kaj tiaj, ke ĉiam pli severa kaj, sekve, pli konsiderinda kaj signifa, fariĝus la Akademia rekompenco.

Bone estus, por atingi tian rezultaton, ke la esperanta gazetaro helpu, pli ol ĝi faris, por konigi la Akademian konkurson kaj ĝian regularon (vidu TUTMONDA JARLIBRO ESPERANTA, 1913—1914, p. II, *Regularo pri Verkoj rekompencitaj de la Akademio kaj OFIC. GAZETO*, Januaro 25, 1914: *Aldono al la Regularo*).

Ni opiniis pli sage kaj pli dece ne montri en tiu ĉi raporto la—kvankam bonajn kaj interesajn—ne rekompencitajn verkojn, tial ke tio povus tute malprave ŝajni al kelkaj ia speco de malaprobo.

Estis elektataj, per sep aŭ ok voĉdonoj (10 Akademianoj voĉdonis; 2 ne voĉdonis), jenaj verkoj, kiuj de nun havas la rajton al la surskribo "Rekompencita de la Akademio":

CH. WAGNER: *Estu Homo*, tradukita de S. MEYER.

H. CONSCIENCE: *Rikke-Tikke-Tak*, tradukita de MARIE POSENAER.

H. A. LUYKEN: *Mirinda Amo* (originala).

H. DE BALZAC: *La Vendetta*, tradukita de M. MERCKENS.

Rolandkanto, tradukita de S-RO NOEL.

Ili ĉiuj sin rekondendas per plene fundamenta korekteco en la stilo, kio estas la unua kondiĉo por meriti rekompencon, kvankam ne la sola.

Estu Homo.—Bonega traduko, bonega enhavo, senerara presado, tiaj estas la kvalitoj, kiujn konstatis en tiu ĉi verketo la Akademio kaj kiujn ĝi intencis rekompenci.

Rikke-Tikke-Tak.—Stilo agrabla, emociplena. Ne tre verŝajna, kelkafoje iom infana estas la rakonto, kiu tamen ĉiam estas interesa, alloga kaj ofte kortuŝanta.

Mirinda Amo (originala) enhavas multajn ĉarmajn paĝojn, kiuj plaĉos eĉ al ne anglaj legantoj, kvankam certe la romano estas pli angla ol internacia. "El lingva vidpunkto *Mirinda Amo* montras tre grandan progreson kompare kun *Paŭlo Debenham* de l'sama aŭtoro. La stilo estas pli eleganta, pli flua; la aŭtoro malpli ofte uzas ĥa kunmetitajn vortojn; la neologismoj estas malmultaj kaj preskaŭ ĉiam klarigitaj; kelkaj gramatikaj eraretoj ensovigiĝis en la libron, sed ili estas ne gravaj."

La Vendetta.—Tre interesa, tre "drama" novelo de fama franca verkisto, tre lerte tradukita—kun vere esperanta kaj fundamenta konscienco—de talentoplena junulo, kiun tro frue por liaj amikoj kaj Esperanto forrabis senkompara morto.

Rolandkanto.—Tiun ĉi epopeon, kun mirinda fideleco verse tradukitan, legos kun vera plezuro tiuj, kiuj ŝatas la militeman poezion de la mezepoko. Por la Francoj ĝi ludas saman rolon, kiel la *Nibelungenkanto* por la Germanoj. Firmaj, korektaj, preskaŭ ĉiam elegantaj estas la versoj de D-ro Noel.

Bonvolu akcepti, estimata Sinjoro Prezidanto, mian respektplenan saluton.

Julio 15, 1914.

TH. CART.

[Ni kore gratulas la gajnintojn pri ilia sukceso, kaj ni kaptas tiun ĉi okazon por esprimi la esperon, ke en la sekvontaj jaroj niaj aŭtoroj pli multnombre eniros la konkurson.—RED., B.E.].



Ampensoj Flugilaj.

Al vi en malproksima land'

La pensoj miaj flugas for'

Al vi trans ondojn de la mar'

Ampensoj iras el la kor'.

Cu iam pensas vi pri mi

Dum pasas tago post la tag'?

Ho! foje sendu eĉ al mi

Penseton per anima sag'.

Malhelpas ne al la anim'

Bariloj iaj sub ĉiel'

La spaco, tempo, tero, mar'

Nenio estas...nur la cel'.

La sag' flugila de l' anim'


Flugante rapidege for'

Alportos malgraŭ ter' kaj mar'

Ampensojn de la kor' al kor'.

J. K. CAMPBELL.

Greymouth, New Zealand.



Ĉi tie antaŭ multaj jaroj ne ekzistis modoj; la homoj ne imitis unu la alian. Ĉia faritaĵo estis la propra esprimo de la laborinto. Kiam junulino faris por si novan robon, ŝi diris: "Mi ne kudros tiaspecan kaj tiakoloran, ĉar mia amikino portas similan." Kiam homo ĉarpentis meblon, li diris: "Mi faros ĝin tute taŭga por la ĉambro kaj konvena al la uzontoj." Kiam oni konstruis dometon, oni diris: "Car ne ekzistas alia tute simila peco de grundo en la vilaĝo, kaj pro tio, ke neniu du homoj tute similas unu la alian, tial ni konstruu tute unikan dometon, taŭgan por la difinita grundo kaj la logontoj."

Anstataŭ la nuntempa modeco regis nian vilaĝon originala spirito. En la ĉambroj ĉio estis tute simpla. Bela ĉio ankaŭ estis, ĉar simpleco estas beleco. Nenia senutila ornamo sin montris; ĉio estis utila kaj elbriligis sian celon. Sur la kamenbreto vidiĝis nur uzotoj. Apud la fajrujo estis ligna benko kun alta dorso, kaj kun flankoj formitaj laŭ plaĉaj konturoj. La muroj ne hontis montri la veran koloron de la plastro. Ĉe la plafono nigre vidiĝis la kverkaj trabetoj, kiuj same kiel la cetero de la endoma lignaĵo, ne kaŝis sin malantaŭ olekoloriloj. Al la homa vivado tiam mankis ĉia objekto, kiun venigis nia moderna mašinaro. Simplaj estis la homoj kun simplaj gustoj. Strange interesa estis la vilaĝo kaj tre elpensemaj fariĝis la logantoj. Kiam venis fremdulo el granda urbo, tiu tute ne komprenis la vilaĝajn kutimojn, morojn kaj mankon de modeco. Ekzemple, se du homoj malpacis pro ia renkontiĝo de strangaj fariĝoj, aŭ kauze de ia lingva fuškompreniĝo (oni bedaŭrinde ne parolis per logika lingvo, kiel estas Esperanto) tiam la malpaco restis neseri- oza tiom longe, kiam unu vorto ne uziĝis. En la tuta lingvo estis nur unu sola vorto, kiu povis naski pugnobatojn, kaj tiu vorto estis "Imitema." Tiu vorto estis la plej insulta por niaj logantoj.

Dum sia tuta vivo logis en la vilaĝo masonisto, kaj neniu homo iam kuraĝis nomi lin imitema. Neniam li dufoje konstruis same laŭ

desegno. Bone estis vidi lin laboranta, sed eĉ pli bone estis aŭdi tion, kion li diris, dum li kreskigis nin. Kiam li masonis nin kamentubojn, li parolis al la ventaj moștoj jene:

"Vi, nordorienta moșto, jus venis de la stepo kaj alportas kun vi torfan belodoron. Tie alte sur la erikejoj kaj rokejoj vi povis pli rapide, senĝene kaj libere flugi, flirtigante la kolharojn kaj longan voston de la stepaj ĉevaletoj. Tie en nebula vetero vi gvidis la stepanon, kiu sen via helpo perdus la vojon. Via moșto vizitis la vilaĝeton, "Widdicombe sur la stepo," kaj poste sekvis la fluon de rivereto pli kaj pli apuden, jen subflugante ponton, jen siblante tra arbaroj, jen kantante al plugisto kaj jen ripozante en proksimaj pomarbejoj. Vi trapasis antikvan Ashburton kaj salutis la farmistojn ĉe la brutofoiro.

Por vi nordorienta moșto taŭgas tre dikmura masonaĵo. Viaj aerfluoj estas kelkfoje frostaj kaj fendigaj. Via moșto malpacas kun la sudokcidenta moșto; vi forpelas ŝin kaj glaciigas ŝiajn larmojn. Pro viaj malpacoj la ŝtonoj apartiĝos, se mi permesos, ke vi intervenu. Bonan morteron mi uzu por konstrui vian vizitejon."

Kaj jen li alparolis alian venton, dum li masonis pluan kamentubon, kiu montris sin kontraŭ la oriento:

"Por vi, orienta moșto, taŭgas fortika, alta konstruaĵo, ĉar vi ja estas potenca. Vi ŝatas ludojn, tial mi faru ĉion oportuna, por ke la fumo libere povu flugi amike kun vi. Tro kruda estas vi; nek mi aŭ la bestoj amas vin, tamen via veno antaŭiras la printempon. Mi ne beligu vian vizitejon, por ke ĝi ne restigu vin. Iru al la Atlantika Oceano kaj tie formortu."

Alifoje li diris:

"Vi, sudventa moșto, jus amuzis vin en la antikva urbo Totnes. Vi sendube haltis ĉe la ponto inter la du altaj montetoj, flustrante al la belulinoj, kiuj kvazaŭ sencele atendas kaj rigardas en la mallumajn akvojn de la Darto. Poste, via sudventa moșto, vi flugos norden tra tuta Anglujo, sed vi ne vidos pli belan

riveron; oni nomas ĝin la Rejno de Anglujo. Forfluginte la ponton vi adiaue ondigis la riveron kaj venis pli apuden al ni.

Por via mosto, kamentubo havu nestejon por viaj hirundoj. Ĉar vi estas milda, nerapidema kaj malofta vizitanto, por vi taŭgas bela, eta masonaĵo kun grimpejo por lonicero kaj rozarbeto. Ĝi ankaŭ havu sunhorloĝon, ĉar kun vi brilas la suno."

Kaj jen denove:

"Por vi ankaŭ mi masonu kamentubon, via nordventa mosto. Ĉar vi vizitos ĝin kiam ĝi multe fumas, ĝi havu ĉion taŭgan; ĝi havu neĝcapon por via neĝo, kaj pezajn ŝtonojn por kontraŭstari vian koleron."

Kaj alitempe:

"Por vi, sudokcidenta mosto, mi konstruu taŭgan vizitindejon. Plorema vi estas, tial ĝi havu faritajn el ardezoj protektilojn kontraŭ viaj larmoj. Milda vi estas kaj kun vi flugas la birdoj, tial ĝi havu levkojejon kaj nestejon."

Kaj jen ree:

"Vi, sudorienta fremdulo, jus forlasis belan fiŝistan vilaĝon ĉe la golfeto Torbay. Tie sur la kajo tien kaj reen moviĝis la pitoreskaj maristoj, dum ie kaj ie pentras artistoj. Vi sekigis la kolorilojn sur iliaj skizoj. Salo estas en via tušo, tamen vi ne estas kruda, kiel estas via orienta frato. Ne rapide vi venas, kvazaŭ vi domaĝas vian maloftan viziton. Ĉu Torbay estas tiom bela?"

Por vi, sudorienta mosto, suficias malgranda masonaĵo. Tamen ĉar vi estas milda, neprema kaj blovas al la enira fronto de dometoj, mi faru por vi belan vizitejon kun grimpejo por rozarbetoj; eble pro ĉio ĉi vi venos pli ofte."

* * * *

Tiel parolis al mi la kamentubo de Devon-sira vilaĝo.

Kiel oni povos vidi ilin?

Per trakampa, unumejla piediro okcidenten el Terbryan. Se la kamentubo diros, ke mi ne ĝuste raportis iliajn dirojn, tiam la vaga vizitinto rakontu pli veran kaŭzon de iliaj pitoreskaj formoj.

TAGULO.



Humorajoj.

Patrino: Jaĉjo, ĉu vi lavis al vi la manojn?

Jaĉjo: Jes, panjo. Se vi ne kredas ĝin, rigardu la vištukon.—*El Amerika Esp.*

— Kelnero, alportu al mi du mole kuiritajn ovojn.

Voĉo (ĉe la apuda tablo):— Al mi ankaŭ, sed ili ja devas esti frēsaj.

— Bone.

Voĉo de la kelnero (de malproksime):— Kvar mole kuiritaj ovoj; du devas esti frēsaj.

Unuaj Impresoj pri Bermuda.

Vidinte Bermudon mi jam povas priskribi feinolandon.

Ĉi tie ĉio devas nepre havi etan kvaliton, ĉar la tuta insulgrupo sin montras sur la karto per nura pinglapunkto, aŭ, por paroli konscience ĝuste, pinglakapo, en la Atlanta Oceano. Tamen ni utiligas kiel eble plej multe niajn colojn.

La ĉefa grupo de insuloj etendiĝas sinsekve dudek kvin mejlojn longe. Ili kušas kiel ĉena arkajo. Ĉiu insulo ligiĝas al la plej proksima per ponto. Unu el la pontoj estas du mejlojn longa, sed la aliaj estas malgrandaj. Tio, kio karakterizas la tipan Bermudan pejzaĝon estas la multnombraj insuloj grandaj kaj malgrandaj, kaj la oftaj golfetoj kaj eniroj de la maro. Oni ĉiam estas apud la maro, ĉar la plej larĝa insulo estas ne pli ol mejlon kaj duonon transe, kaj ĝenerale oni povas vidi la maron ambaŭflanke.

Veturante vi eliĝas de sub aleo da cedroj kaj ĉirkaŭiras dolĉe belan golfeton havantan ĉenon da insuletoj trans la malfermaĵo. La blua akvo—kaj ĝi sendube estas blua—plaudetas mallaŭte preskaŭ ĉe la veturilaj radoj. Estas nenia onda ŝaumo, escepte en la vintro, ĉar la rifoj etendiĝantaj ĝis dek mejloj en la oceanon efektive malhelpas la formiĝon de ondoj.

La ĉefan koloron de la pejzaĝo donas la olivverdaj cedroj. Ĝi variigas per la pli flava verdo de la herbaĵo kaj de la brile rugaj kaj rozkoloraj oleandraj kaj hibiskaj floroj. La maro mem bezonus tutan koloraron por ĝin pentri. Parte indigkolora, parte helverda, kun purpure-brunaj makuloj kaj strioj, kie sin kašas la markreskaje kovritaj rifoj, ĝi liveras trezoron de plezuro al koloramanta okulo.

La domoj entute neĝblankaj estas konstruitaj el korala ŝtono, kiu estas tiel mola, ke oni povas ĝin elsegi en kvadrataj de la viva ŝtonamaso, sed kiu malmoliĝas grade en la aero.

Nu, ĉu vi povas imagi la bildon? Intensa sunlumo, kiun oni sentas trairi la korpon; en la antaŭaĵo la maro; tie kaj ĉi tie verdaj insuletoj cedre kronitaj kaj zonitaj per blanka aŭ oranĝora sablo; malantaŭe ĉe la horizonto, arkajo el malalta tero punktigita are kaj unuope per blankaj domoj. Kaj la nubo—mi devas ne forgesi la nubo! Tion, kio mankas al la pejzaĝo rilate grandiozecon, liveras la nubaro. Precipe en la vespero la nubformoj kaj koloroj estas mirigaj kaj ravaj.

Ĉi tie la suno briladas preskaŭ ĉiam. Kiam pluvas, tio okazas precipe nokte. Sed, se la

vetero ŝajnas iom pluva, vi nepre taŭge provizu vin, se vi volas eliri, ĉar du minutoj da Bermuda ekpluveto egalas tutan subiĝon en la maro.

La domoj havas plejparte unu etaĝon, kaj ĉiu havas sufice grandan balkonon, kiun oni multe uzadas escepte mezsomere, kiam la kuloj pelas ĉiun interne de la metalgazaj pordoj kaj fenestra-ŝirmiloj. Nun vi ekvidetas la du-tri malagrablojn de vivado en Bermudo, ne—mi murmuru en via orelo—cititajn en la gvidlibroj!

Ekzemple, la blatojn! Ĉu ni iam forgesos la unuan vesperon, post kiam foriris la geomikoj, kiuj ĵus akceptis nin en la pastrejon, kaj kiam ni ĉirkaŭiris la domon, kun lampo en la mano, por survidi la novan hejmon! Brrr! La ĉambroj ŝajnis esti vivaj. Irante en la lit-ĉambron ni trovis araneon tiom grandan kiom mia manplato, kun ŝajne blanka korpo. Ĉasinte ĝis mortigo la naŭzan insekton, mi trovis, ke la blankajo estas silka sako plena je malgrandaj araneidoj, kiujn la patrino tiamaniere portadis.

Unu vesperon ni devis tute forigi la litukojn kaj serĉi colon post colo la littrabaron por trovi kaj mortigi blaton, kiu preskaŭ frenezigis mian edzinon ĉirkaŭkurante en la lito! Ĝis nun ni ne ekvidis centipedon, esceptinte ekzempleron konservitan en alkoholo, kaj ni ne sopiras al la unua renkonto.

Ni ankoraŭ ne konatiĝis kun multe da enlande naskitaj Bermudanoj, sed tiuj, kiun ni renkontis, montris tiun afablecon kaj gastemecon, kiu karakterizas la kolonianojn. Nia hejmo kaj posteno troviĝas sur Ireland Island, kiu estas milita stacio, kaj estas logata precipite de oficistoj kaj ŝipejaj metiistoj.

Estas nur du urboj en Bermudo—Hamilton la ĉefurbo, kaj St. George's. Sed sur la tuta teraĵo vi vidas domojn disvastigitajn pli aŭ malpli dense. Por atingi Hamilton voje de Ireland Island oni devas veturi preskaŭ cirkle dek ses mejlojn. Sed tion oni faras nur kiel ekskurson. Ordinare oni vojaĝas vaporŝipe trans la golfo kaj atingas Hamilton post tri kvaronoj de horo.

Ireland Island estas mejlon kaj duonon longe kaj de cent futoj ĝis kvaron-mejlo large. Tial oni ĉiam estas proksime al la amikoj. La tuta cirkonstanco faras, ke la socia vivado estas tre intima—kompreneble interne de la klare difinitaj limoj kutime trovataj en militaj kaj oficistaj cirkloj.

La vespero estas la socia tempo. Tiam oni sin banas familie kaj socie en la maro. La akvo neniam estas malvarma. Ĉiu golfeto faras idealan banejon; efektive ĉiu havas

kvazaŭ privatan banejon ĉe la malantaŭa dompordo...

La krepusko iom subite falas, kaj pli frue ol en Anglujo. Tiam la banigintaj grupoj sidas sur la balkonoj kaj babiladas, ĝuante la nevarmetecon. Estas muziko kaj kantado kaj trinkado de citronaĵo. Poste la grupo moviĝas are al la domo de alia amiko. Estas ludoj, konversacio, kaj—pli da citronaĵo. Pli malfrue tiuj, kiuj logas ĉe ĉi tiu ekstremajo de la insulo akompanas tiujn, kiuj logas ĉe la alia al ilia hejmo. Alveninte la akompanitoj deziras, ke la akompanintoj eniru por momento, antaŭ ol reveni. Ankoraŭ pli da citronaĵo! Estas ja mirige kiom multe oni povas kaj devas trinki. Sed oni ĉiam ŝvitadas. Eĉ dum ripozo la vizaĝo kaj manoj estas malsekaj. Kiam oni laboras, tiam la gutoj faladas! Estas iom surpriza fakto, ke vivado ĉi tie ne kutimigas logantojn al la varmeco. Kontraŭe la Bermudanoj kaj delongaj logintoj pli plendadas ol ni novealvenintoj, kaj oni diras, ke ni suferos pli en la sekvonta somero ol en la nuna. Estus interese ekscrii, ĉu farigas same en aliaj varmaj klimatoj.

Estas nur du industrioj en Bermudo: la kulturo de terpomoj kaj bulboj, kaj la ekspluatado de Amerikaj turistoj! La dua estas ĉefa! Pri nuntempaj okazoj, kaj la ŝangoj kaŭzitaj de la rego de militista leĝo mi ne devas diri, por ke mi ne kolerigu lian cenzuritan moston!

R. EDIS FAIRBAIRN.



Pensoj.

“Estas la kapitalistoj, kiuj incitas al la milito. Ili estas la mastroj de ĉiuj landoj, de Francujo precipite. Ili estas la mastroj de la registro kaj la ministroj estas sensignifaj personoj kompare je ili. Ili ne ŝatas eble la militon; ili eĉ ŝintimas. Tio, kion ili ŝatas, estas la milit-preparado.”

“Sed la ‘paco armita’ estas la Brutigo de Popolo por riĉigo de kelkaj. La laboristoj en ĉiuj landoj kuniĝu laŭ la devizo de ‘Laborista Internacio.’ Ili manpremu reciproke; ili estas la multenombro, ili estas la forto kaj precipite la racio. Per ilia unueco naskiĝos iam la Tutmondaj Unuigitaj Ŝtatoj.”

Parolado de Anatole France ĉe la “Centrale d'éducation ouvrière” de la Maison du Peuple de Bruxelles (20 Dec., 1913).

El *Le Travailleur Esperantiste*.

Declension in Esperanto.

Translated from the French of Drs. L. COUTURAT and L. LEAU in their work "Histoire de la Langue Universelle," Paris, 1903, p. 336.

Declension in Esperanto is reduced to the minimum, conformably with the remark of Leibniz that prepositions replace cases, and advantageously so, since they are more numerous and more precise in their meaning. So the accusative only has been retained, the only case which cannot be supplied by a preposition. Certain critics find that even this case is superfluous, and challenge the utility of the accusative. They allege that modern languages tend to the suppression of cases; that most of them have no longer any declension, and even in those that have it, German for example, the accusative is often identical with the nominative. They conclude that the admission of an accusative is a useless complication, which is retrograde to the evolution of languages.

We confess that arguments, claiming to be scientific, drawn from general considerations of the evolution of languages affect us but little. The whole question is to know whether the accusative is useful or not. The Esperantists maintain that it is useful; and in reply to the arguments of fact, they point out that if the modern languages have discarded the accusative in nouns, they have taken care to retain it in the pronouns. Now it is necessary that the rule be general and without exception; and the opponents of the accusative suppress it even in the pronouns. The consequence is that it is only by position that they can distinguish the subject from the direct object; they bind down the sentence to a rigid construction. It is all up with the flexibility of the sentence, useful though it be, were it only for translations. We can therefore propound this dilemma: either the International Language must have an accusative, or else it can have no freedom of construction. It remains to decide which of these two alternatives involves the greater inconvenience. We believe that it is the second, for we know what the French language loses in suppleness, and sometimes even in lucidity, by its uniform and so-called *logical* construction, which prevents the most important word of the sentence from being placed conspicuously, except by the awkward, clumsy, and sometimes even misleading construction: *C'est...qui (que)....*

But there is at least one case in which uniform construction must give way, namely in regard to relative propositions. Whatever

the "case" of the relative pronoun, it must connect the relative proposition to the principal proposition, and consequently must come at the head of the former. And then we are exposed to ambiguities, as in the following sentence, which we have not invented, but have extracted from our reading during the time we have been writing this work:—

[Literal translation]: "One will remark what habits of serious construction impose upon the inhabitants of Mzab the digging of wells as deep as theirs, and of which the upper part is usually walled to the height of several metres, as well as the erection of the two pillars of masonry on which must rest the beam which carries the pulleys."*

If we should endeavour to avoid obscurity by relegating the verb to the end, we should render such sentences unintelligible, as frequently happens in German.

Lastly, the accusative permits the avoidance of other ambiguities, which no mere arrangement of words could suppress, as in the phrases: *I hear him better than you*; or, *I found the bottle broken at the well*. It also permits distinction between the place to which one goes and the place in which one is, which we could not otherwise have except by varying the preposition, a device still more burdensome for the memory. All these advantages plead in favour of the accusative. We may say that without the accusative the International Language could not possess the flexibility, the delicacy, and the precision necessary for the rendering of all the shades of thought. And we must not forget that one of the principal uses of the International Language, perhaps the most important at first, will be the translation of scientific works. Those who restrict the use of the International Language to business conversation and commercial correspondence may hold flexibility cheap and prefer rigidity; but for the faithful translation of works written in all sorts of languages the International Language ought, on the contrary, to possess the greatest flexibility which is possible without detriment to lucidity. In this respect Esperanto has stood the test by its numerous translations of literary works, which are exact reproductions of the original text, even when this is in verse.—A.E.W.

* Oni rimarkos, kiajn kutimojn de serioza konstruado trudas sur la logantojn de *Mzab* jen la fosado de putoj tiel profundaj, kiel iliaj, kies supra parto estas ordinare masonita ĝis kelkaj metroj da alteco, jen la starigado de la du kolonoj masonaj, sur kiuj devas ripozi la trabo, kiu portas la puliojn.—[Translator's remark.]

Rusaj Emigrantoj en Los Angeles, Suda Kalifornio.

Sendube jena artikolo el nia bonega kunfrato *La Ondo de Esperanto* interesos ne nur ties rusajn legantojn, sed ankaŭ niajn anglajn kaj amerikanajn.

Verŝajne multaj legantoj de *La Ondo* memoras la unuan paroladiston, vojaĝantan tra Esperantujo Amerikanon, S-ro D. E. Parrish, kiu al nia Ruslando alportis informojn pri mirinda lando, nuntempa Suda Kalifornio. Li estis ankaŭ en Petrogrado, parolis antaŭ nia Esperantista aŭdantaro, plenumante sian taskon: propagandi Sudan Kalifornion.

En koroj de multaj junuloj restis varma deziro foriri al tiu ĉi, bilde vidita, mirinda sudlando. Sed ne ĉiuj deziroj plenumiĝas. Tamen kelkfoje eĉ plej fantaziaj kaj nekre-dindaj revoj efektiviĝas.

Jen mi, junulo el Estlando, el vasta Ruslando, antaŭ unu jaro loĝinta en Petrogrado, nun loĝas en tendo sur insulo Santa Catalina (legu Katalina) en Pacifika Oceano kvardek verstojn* ĉe bordoj de Suda Kalifornio. Tie ĉi mi loĝas en tendurbo, ĝuas varmon de sudlanda suno kaj ankaŭ pli ofte malvarman venteton de vastega Pacifiko. Tie ĉi mi ofte dum liberaj horoj maršadas sur montoj de dezerta insulo, rigardas orienten kaj norden, de kie vidiĝas montoĉenoj de Sierra Madre depost kovrita de nebulo fruktoriĉa valo de Suda Kalifornio, rigardas sud. okcidenten, kie estas nur oceano kaj blua ĉielo. Kaj jen denove mi revas pri aliaj landoj kaj ofte pri Ruslando malproksima, pri gesamideanoj Petrogradaj. Sed ne pri revoj mi volis rakonti.

Estas en Suda Kalifornio multaj rusoj emigrantaj el Suda Ruslando kaj el Kaŭkazo — pri ili mi volis rakonti hodiaŭ al rusaj geesperantistoj.

Rapidvagonaro nin portis kun amiko el Petrogrado al Berlin, poste al Hamburg. Multajn tagojn ni veturnis sur Atlanta oceano ĝis New York. Kvin tagojn vento balancadis nian ŝipon sur oceano kaj Meksika golfo, kiam ni veturnis el New York al New Orleans. Tri tagojn Amerika rapidvagonaro nin portis okcidenten tra tropika Louisiana, duondezerta Texas, inter sablaj montoj de Arizona, kie nur malofte vidiĝis tendoj, dometoj, kaj grandaj kornbestaroj, gardataj de rajdantaj sur rapidaj ĉevaloj, paštistoj (cowboys).

El sabla dezerto, Imperial valo, nia vagonaro la trian matenon eniris en mallargan valon inter la ĉokoladkoloraj montoj. Jen aperis unuaj palmoj, valo pilargiĝis, aperis kampoj kovritaj per nekonataj al ni fruktaroj kaj inter la kampoj estis nekulturata dezerto.

Baldaŭ ni estis en Los Angeles, supozante ke ni estas eble unuaj ruslandanoj en tiu ĉi junia, ankaŭ malmulte konata en Ruslando, parto de kulturata okcidento de Unuigitaj Ŝtatoj. Sed ni multe eraris.

Kvazaŭ fabelo sonis la oreloj de inteligentaj Petrogradanoj la rakonto de S-ro Parrish pri Suda Kalifornio. En grandega biblioteko de Aleksandro III. en Petrogrado mi ne povis trovi libron pri Suda Kalifornio. Sur niaj rusaj landkartoj estas notata Santa Monica, malgranda urbeto ĉe Pacifika Oceano, sed mankas ĉefurbo de Suda Kalifornio, Los Angeles, enhavanta nun 550,000 loĝantojn: niaj geografiistoj verŝajne ankaŭ ne trovis ĝin.

Sed sciis pri Los Angeles neinteligentaj laboristoj el Kaŭkazo. Ili ne legis pri ĝi en libroj aŭ ĵurnaloj, ĉar plejmulto da ili ne scias la arton de legado. Multaj kaŭzoj estis devigintaj kelkajn el ili foriri el hejmolando por serĉi novan patrujon. Kaj tiuj ĉi foririntoj sciigis aliajn jam antaŭ multaj jaroj pri konstruata de Amerikanoj grandioza lando, Suda Kalifornio. Jam antaŭ dekoj da jaroj kaŭkazaj laboristoj sciis pri grandegaj akvokondukiloj en Suda Kalifornio. Multaj el ili partoprenis konstruadon de grandega akvokondukilo de Los Angeles, kie 3,000 laboristoj estis okupataj dum ok jaroj, borante tunelojn tra la montoj, fosante teron en dezerto, konstruante akvokondukilon pli ol 350 verstojn* longan, kiu nun liveras akvon tra montoj kaj dezerto el neĝkovritaj montoj de Sierra Nevada al la urbo Los Angeles. Jam multajn jarojn rusaj laboristoj helpas al Amerikanoj konstrui grandiozajn konstruaĵojn, kulturi fremdan landon kaj fari el dezerto de Suda Kalifornio, plej fruktoriĉan ĝardenon en la mondo. Multaj venis tien ĉi, multaj foriris, sed ankaŭ restis multaj en fremda lando.

— Ĉu estas pli bone tie ĉi, ol en hejma Kaŭkazo? — mi demandis unu junulon rusen.

— Trioble pli riĉa, trioble pli bela estas nia Kaŭkazo, ol tiu ĉi laŭdegata Kalifornio, — li respondis.

— Sed ne estas lernejoj en nia lando, — li daŭrigis.

Jam pli ol duonjaron mi konas nun tiun ĉi junulon. Li alvenis antaŭ jaro kaj duono, ne konante la arton de legado kaj skribado, ne komprenante misteron de nombroj. Dek-naŭjara junulo li estas. Nun jam duonjaron li

* 27 anglajn mejlojn.

* 235 anglajn mejlojn.

vizitis Amerikan lernejon. Li lernas anglan lingvon, anglajn librojn li legas, li lernas aritmetikon kaj, kiam mi vidis lin la lastan fojon, li min demandis jam pri decimaloj. Dum duonjaro tie ĉi li lernis, kion li neniel povis lerni dum dekok jaroj en Ruslando.

Ekzistas en Los Angeles urboparto, nomata "Rusa kolonio." Logas tie pli ol 3,000 rusoj, kies plimulto alvenis el Kaŭkazo. Plimulto da ili estas sektanoj: "molokanoj" aŭ "duhoboroj."

Unu tagon mi iris vidi tiun ĉi rusan urboparton. Estas efektive rusa urbo. Afijo magazenaj estas en rusa kaj angla lingvoj. Mi vidis vendejon, kie kune kun pano kaj rusaj sarafanoj estis elemetitaj en fenestro rusaj libroj, malkaraj eldonajoj de l' konata Sitin. Multe da ŝeloj de sunfloraj semoj estis disjetitaj sur la strato... Kaj fine rusaj homoj, efektivaj rusaj viroj aperis—viroj kun longa barbo kaj ruĝaj aŭ nigraj ĉemizoj, ruse vestitaj; virinoj en naciaj multkoloraj sarafanoj. Eĉ pli ruse tiu ĉi urboparto de Los Angeles aspektas, ol multaj stratoj de Petrogrado, ĉefurbo de Ruslando.

Oni diris al mi, ke tie ekzistas rusa lernejo kaj post kelkaj demandoj mi atingis domon, kie lokiĝis la lernejo. Dum mi rigardis la domon, alveturis homo kaj angle min demandis, kion mi serĉas.

— Rusan lernejon,—mi respondis.

— Jen ĝi estas.

Kaj dum ni interparolis, oni ekkantis en la domo. Stranga, kvazaŭ iom konata, sed tamen nekonata melodio. Kanto religia de molokanoj.

Poste lernantoj eliris, knaboj, knabinoj gaje babilante ruse kaj angle.

Mi eniris en la lernejon. Mizera ĝi aspektis kompare kun belegaj marmormuraj lernejoj de Amerikanoj. Nur lignaj muroj, kelkaj benkoj, du longaj tabloj kaj du malgrandaj tabuloj sur muroj tie ĉi estis.

Meze de infanoj klopojis du homoj. Forta homo kun longa barbo en rusa ĉemizo, la ĉefinstruisto. Li tre afable respondis mian saluton kaj demandon pri interparolado kaj baldaŭ ni amike interparoladis.

Instruisto estis ĉarpentisto el Baku. Li nur antaŭ duonjaro estis alveninta kaj ankoraŭ tute ne parolis angle—maljuna homo ne facile lernas fremdan lingvon.

— Niaj infanoj lernas en fremdlingva lernejo, kie oni instruas nek religion, nek Biblion, nek nian lingvon, kaj tio nin treege maltrankviligas. Niaj infanoj fremdiĝas, forgesas nian lingvon kaj religion. Tial niaj fratoj jam multajn jarojn penis malfermi propran rusan lernejon.

Ekzistas jam pli frue tie ĉi aliaj rusaj lernejoj kaj jen nun ni denove malfermis someran lernejon — li rakontis al mi.

Mi devas diri al rusa leganto, ke instruado de infanoj estas senpaga kaj deviga en ŝtato Kalifornio. La lingvo lerneja estas angla kaj nenia religio estas instruata en lernejoj. Biblio ne estas instruata, eble ĝi estas nur iafoge legata kiel ĉiu alia libro.

Alian tagon mi revizitis la lernejon. Estis leciono kaj mi ĉeestis, kiam oni legis ion el Nova Testamento. Mi plu ne memoras tekston, kiun oni legis, sed estis io pri homoj, kiuj fariĝas pli sovaĝaj ol bestoj.

Tie ĉi la instruisto haltigis la legantan knabon kaj komencis klarigadon :

— Jen infanoj, ĉu vi komprenas? La homo, reganto de mondo, ofte eĉ nun fariĝas malpli bona kaj pli sovaĝa ol besto. Jen kial ekzistas teruraj mortigiloj. Ili tute ne estas necesaj, ili tute malaperus, se homoj vivus laŭ ordonoj de Dio.

Tion li instruis en lernejo.

— Peka estas la mondo. Eĉ inter niaj junuloj ni vidas multajn, kiuj fumas tabakon, drinkas kaj fariĝas pli malsagaj ol bestoj. Kaj Amerikanoj, sagaj homoj ili estas, sed iliaj infanoj kuras tra la stratoj, vendante pekajn gazetojn kaj legas la gazetojn. Tio estas peko. Kaj lumbildo, elektroteatro estas sur ĉiu strato. Tio ankaŭ estas peko.

La lernantoj serioze aŭskultis.

— Onklo Ivaĉjo,—unu el knaboj demandis serioze pensante,—diru, ĉu aŭtomobilo ankaŭ estas peko?

Onklo Ivaĉjo serioze ekpensis kaj post momento malrapide decidis :

— Ne, aŭtomobilo ne estas peko, estas utila afero, estas veturilo, ne estas peko.

La leciono finiĝis. Mi iris hejmen, ĉar estis malfrue.

Poste, la alian tagon mi vizitis onklon Ivaĉjon en lia hejmo. Mi demandis lin, kial tiel multaj molokanoj foriris el Kaŭkazo kaj venis tien ĉi en fremdan landon.

— Estas libereco, kion ili serĉas,—li respondis.

— Verŝajne vi aŭdis pri persekutadoj kontraŭ sektanoj en Ruslando. Multaj niaj pravoj estis ekzekutataj, ekzilataj al Siberio, malliberigitaj, sed ili ne volis forlasi sian religion. Ili sekrete kunvenadis en arbaroj en montoj nokte kaj tie havis siajn Diservojn. Kelkaj forkuris el malliberoj en Siberio kaj serĉante pli liberan landon venis tien ĉi.

Oni ne donas al ni pasportojn kaj tial multaj dum mallumaj noktaj transiras sekrete la landlimon, ofte kuras for de kugloj de gardistoj.

Terkulturistoj ni estis en nia lando, sed tie ĉi ni devas labori en urbo. Ne plaĉas tio al niaj fratoj kaj ĉiam ili soperas pri la tero.

— Diru al mi pri via religio,—mi petis.

— Biblio estas fundamento de nia religio. Ni penas agi kaj vivi laŭ ordonoj de Kristo. Ni ne havas pagatajn pastrojn aŭ estrojn. Ne estas regantoj inter ni. Ĉiuj estas egalaj. Ni ne bezonas policistojn, nek militistojn. Ni helpas unu la alian. Se mortas homo en familio, aliaj fratoj helpas al la restintaj familiianoj. Se junulo edziĝas havante nek domon nek havajon,—li invitas fratojn ĉeesti edziĝan feston kaj ĉiuj alvenas portante donacojn. Okazis en stepoj de Antaŭkaŭkazo, ke eĉ ĉevalojn oni donacis al junaj geedzoj.

Interesa ŝajnis al mi tiu ĉi religio de simplaj bonkoraj rusaj vilaĝanoj en malproksima Suda Kalifornio. Kvazaŭ miksaĵo de kristanismo, socialismo kaj anarhismo ĝi estas.

Alian fojon dum libera dimanĉa tago mi vizitis preĝejon de molokanoj. Stranga aspektis al mi Diservo dē sektanoj. Estis nenia predikisto, nenia pastro. Oni silente staris aŭ sidis. En mezo de l' ĉambro estis neokupita loko. Post kelkminuta silento unu el knaboj aŭ knabinoj ekkantis melodion de religia kanto, aliaj lin helpis kaj baldaŭ jam ĉiuj kantis fervore unutone. La takto pli-rapidigas. Kantantoj jam preskaŭ krias. Jen virino elkuris al la neokupita loko, ŝi genufleksiĝis, ŝi estas sur genuoj, ploras, ion parolas, pregas... Kanto fariĝas ankoraŭ pli laŭta, pli rapida. Unu virino foriras, la alia alkuras. Ŝi ne pregas, ne parolas, sed preskaŭ ferminte oculojn rapide ekdancas sub la takto de bruanta kanto. Rapide, rapidege, peze ŝi dansaltas. Ankoraŭ alia virino alkuras kaj ekdancis fanatike...

Mirigite, kortuſite, timigite mi rigardis.

Instruo de molokanoj estis bela kaj bona, sed ne plaĉis al mi religia ceremonio, la dansaltado en preĝejo.

Kial oni persekutas tiujn ĉi homojn en Ruslando, kompreni tion mi ne povis kaj nun ne povas. Laboremaj ili estas, ili ne drinkas, ili estas fortaj, lernemaj, bonaj homoj. Eĉ tie ĉi en fremda lando, kie konkurado estas granda, kien ili alvenis sen mono, sen sperto, sen lingvo, kun nura fizika forto de korpo—eĉ tie ĉi ili dum kelkaj jaroj sukcesis akiri teron, akiri domojn. Ne grandajn terspacojn, ne deketaĝajn domojn ili havas, sed tamen kelkaj el ili valoras milojn da dolaroj.

Kaj ĉu ili restas molokanoj en Ameriko? Mi ne kredas, ke jes. Eble maljunuloj jes, sed infanoj kaj geknaboj estas devigataj lerni en Amerika lernejo, kie oni instruas pri pro-

greso de homaro, pri civilizacio, kie oni lumbilde montras, kiel kreskas herbo aŭ kiel eliras el ovoj birdidoj. Hejme la gepatroj diras, ke lumbildo estas pekaj.

Estas multe da similaj aferoj. En Amerika lernejo oni instruas ilin pripensi la aferojn, kaj certe ili pripensos multon. Ili komprenos, ke saltado dum religiaj kunvenoj estas nur sekta malkompreno. Ili komprenos, ke longa barbo kaj rusaj naciaj ĉemizoj aŭ sarafanoj ne faras homon pli bona aŭ pli sankta. Sed tamen la gepatroj ne permesas porti kolumnon aŭ vestaĵon Amerikan. Restas aŭ fariĝi vera Amerikano kaj forlasi ĉion hereditan de rusaj gepatroj, aŭ foriri el urbo al ankoraŭ sovaĝaj partoj de Ameriko, kien maſinoj kaj Amerikanoj ankoraŭ ne penetrис. Infanoj de molokanoj jam rapide Amerikaniĝas. Maljunuloj tion komprenas kaj ankaŭ tial deziras foriri el urbo.

Kaj revoj de molokana frataro pri la tero iom post iom efektiviĝas. En Arizona estas unu el iliaj terkulturistaj kolonioj—pli ol tridek familioj loĝas tie. En Malsupra Kalifornio, en Meksikujo, ekzistas alia kolonio. Dum pasinta Februaro multaj familioj forveturis el Los Angeles al la tero en Mezan Kalifornion. Samtempe alia kolonio estis fondata en Utah.

Kiel ili sukcesas, mi ankoraŭ ne scias. Sed mi esperas kaj kredas, ke laborema homo ne pereos en libera kaj vasta lando. Pereos eble ilia nacieco, ilia lingvo—pest kelkaj dekjaroj. Kaj eble iam iliaj infanoj aŭ nepoj, jam kiel Amerikaj turistoj, vizitos Ruslandon, la landon el kie elmigris iam iliaj prapatroj.

P. TOBI.*

Kalifornio, Ameriko.



La Ekzilito.

Ho ve al tiu, kiu devas vivi
For de l' gepatroj kaj de la gefratoj!
Malgojo al li rabas la feliĉon;
Forvagas flanken ĉiam liaj pensoj
Al la gepatra domo, kie suno
Al li aperis la unuan fojon,
Kaj samdomanoj ĉiam pli kaj pli
En ludo alligiĝis reciproke.

Ifigenio en Taŭrido.

* Traduki aŭ uzi kiel materialon por gazetartikoloj la enhavon de tiu ĉi artikolo estas permesite kun kondiĉo, ke oni sciigu pri tio la aŭtoron laŭ adreso: Mr. P. Tobi, 1327 Georgia-street, Los Angeles, Cal., U.S.A., kaj ke oni notu en nacilingva artikolo, ke la sciigoj estis ricevitaj per Esperanto.

The British Esperanto Association (Inc.).

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

EXTRACT FROM RULES.—“If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member.”

CHARLES COMINS, F.C.A., 50, Cannon-street, E.C.; JOSEPH SILBERNIK, 240, East 19th-street, New York City; DR. R. C. J. STEVENS, Old Alberta, Canada; P. S. G. DUBASH, 6, Highbury-place, London, N.

NEW FELLOW.

EDGAR DEPLEDGE, Halifax.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

*MISS IRENE JONES, *MRS. ARTHUR JONES, Swansea.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

*MISS M. OCKENDEN, Newtown, S. Wellington, New Zealand.

* Denotes that the candidate has passed with distinction.



NEW MEMBERS FOR THE NEW YEAR.

There are very many readers of “The British Esperantist” who are not at present Members of the Association.

A New Year will soon be upon us, and, therefore, all who are able to join are invited to do so at once.

In this critical time of European War Esperantists should bear in mind how essential it is to unite for the furtherance of our Cause and the support of our Association.

On the Continent our “samideanoj” are more severely shaken than we by the shock of the war, but we may be sure that when they emerge from the struggle nothing will be more encouraging and stimulating to them than the evidence of a strong movement in this more happy land. Therefore we think that, for the general advantage of the Cause, our Association should see a great increase in Membership during the year 1915. We await with confidence the response of our many well-wishers, recommending to their immediate notice the special form printed on page vi. of this number.



Correspondence between Countries at War.

Through the sudden outbreak of war many persons who were residing or travelling in enemy lands found that they could no longer communicate with their relatives or friends. To help them as far as possible, the Universal Esperanto Association, whose central office is in Geneva, has just informed its Consuls in the various belligerent countries (Esperanto Consul for London, 17, Hart-street, Bloomsbury, W.C.) that it will willingly look after the exchange of private correspondence between countries at war. Letters should be written English or Esperanto, and be very concise. They must be sent in unsealed envelopes, and must not contain anything likely to be taken as a reference to military or political affairs. They will if necessary be translated by the Association. Those who wish to avail themselves of this service are requested to send all letters to the Central Office of the Universal Esperanto Association, 10, Rue de la Bourse, Geneva, Switzerland, together with a 2½d. stamp or a reply coupon.



Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni empresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niuj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses pencojn (25 spesdekojn) por trilinia empresajo kiel sube (pli ol tri linioj po tri pencoj por ĉia komencita linio); ĉiu Membro de la Asocio havas la rajton fari unu empresajon senpage. Bonvolu skribi legeble, rekte al la Redakcio.

551. Bowden (Sud-Aŭst alio).—S-ro N. R. Johanson, Park-terrace, deziras korespondadi kun gesamideanoj de aliaj landoj.

Council Meeting, B.E.A.

Held at the Offices of the Association on Monday, October 19, 1914, at 6.30 p.m. Present: Mr. H. B. Mudie (chairman), Messrs. J. Bredall, P. J. Cameron, B. Chatterton, H. A. Epstein, Charles Evans, C. A. Fairman, R. Holder, G. Mercer Hollis, A. Honeysett, B. E. Long, A. Morrow, W. Phillimore, F. M. Sexton, S. H. Taylor, Dr. J. Pollen, Misses L. S. Grant, C. M. Holmes, E. O'Brien, J. Wynter. In attendance: Mr. E. A. Millidge, Mr. A. E. Wackrill, The Secretary.

Esperanto and the War.—Mr. Mudie showed a specimen of the War Reports in Esperanto issued by the German and Austrian Governments, and reported that he had proposed to Sir Edward Grey the publication of the White Paper (“Great Britain and the European Crisis”) in Esperanto, the reply being a polite refusal. Letters were also read from M. J. E. Tilney, an American, J. M. Warden, and General Sébert in reference to the use of Esperanto for official documents. The Council approved the suggestion of Dr. Pollen that the circular of the English Church dignitaries in reply to the German theologians should be done into Esperanto, and it was resolved that such translation should appear in THE BRITISH ESPERANTIST for November, and afterwards be reprinted in brochure form for general distribution.

Excursions to the Paris Congress.—The Council expressed their appreciation of Messrs. Cook & Sons, endeavours in regard to the excursions, and their thanks for the very generous settlement the firm had made with the Esperantists.

“Travivaĝoj.”—It was reported that Mr. Sharpe had offered to sell to the Association the new edition of this work (900 copies) for £12 10s. It was decided to accept with many thanks.

“Nova Sento.”—It was decided to accept, with thanks, Mr. Hyams’ offer to present the whole edition of this work to the Association.

Aid for Refugees.—Miss Holmes proposed a concert at the Alexandra Palace for the Belgian refugees if permitted. It was decided to ask the London Federation to co-operate.

The President.—Dr. Pollen, on behalf of the Council, congratulated the President on his appointment as Lieutenant in His Majesty’s Army, and in thanking the Council, Lieut. Mudie stated that he would be leaving for France on Wednesday morning.



The Examinations Committee begs to announce that on Monday, December 14, at the offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C., will be held an *Examination for the Preliminary Certificate*, at 7 p.m., and on Tuesday, December 15, an *Examination for the Advanced Certificate*, at 6.30 p.m. Candidates should intimate as soon as possible their intention to be present.



Council and Executive Meetings, B.E.A.

Notice is hereby given that the next meeting of the Council will be held on Monday, November 16th, at the Offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C., at 6.30 p.m.

A Meeting of the Executive Committee will follow the Council Meeting.

H. CLEGG, Secretary.



554. Preston (Anglujo).—S-ro Alan Cross, Eastwood Lodge, Garrison-road, Fulwood, komencanto, deziras korespondi kun pli progresinta alilanda samideano.